

*EL POPOLA*

中國報道

**CINIO**

II 1982



# La Buji-oj

Fotoj de WANG SHOULIANG kaj ZHOU YOUMA

La nacieco Buji estas unu el la ĉinaj nacimalplimultoj. Ĝi nombras ĉirkaŭ 1.8 milionojn da membroj, kiuj loĝas ĉefe en la provinco Guizhou en sudokcidenta Ĉinio.

Iliaj vilaĝoj situas plejparte ĉe montpiedo, proksime al ebenajo. Iliaj domoj, du-etaĝaj aŭ unu-etaĝaj, sin kaŝas en bambuaroj. En la supra etaĝo loĝas homoj, kaj en la malsupra ili bredas brutojn.

Originalaj estas iliaj vestoj. La viroj portas nigran aŭ kolore kraditan kaptukon, jakon aŭ robon kaj longtuban pantalonon. La virinoj sin vestas per jaketo kaj loza plisita jupo aŭ per jaketo kun borderitaj kolumo, ŝalko kaj manikoj kaj loza plisita jupo. La jupo estas farita el koton



Buji-aj knabinoj



Buji-oj ludas kuprajn tamburojn por festi feston aŭ transloĝiĝon.



ŝtofo kun vakse tinkturitaj nigraj florajoj sur la blanka fono. La virinoj portas nigran zonan hele borderitan. Antaŭ la edziniĝo la virinoj havas tuberforman harligon kun desegnita kaptuko sube, kaj post la edziniĝo ili portas ĉapon en bambua ŝelo kovrita per nigra ŝtofpeco.

La buji-oj ŝatas gluan rizon kaj ofte donas al parencoj kaj amikoj manĝaĵojn el tia rizo kiel donacon. Ankaŭ la akuŝintinoj manĝas tian manĝaĵon, ĉar ĝi estas nutra.



La kapornamo de la fraŭlinoj



La kapornamo de la edziniĝintaj virinoj


Antaŭ la pordo





Planto kun pikiloj kulturata por plekti heĝon kontraŭ rabobestoj

Virinoj brodas aplandaĵojn.



Oni plektas bambuajn korbojn.



# EL POPOLA ĈINIO

中國報通

1982  
N-ro 11  
(290)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

## SUR LA KOVRILO:

Li Jizha, modela laboristo de la tutlanda petrolprodukta branĉo kaj estro de la putobora ŝipo Bohai n-ro 6 sub la Ĉina Buroo de Mara Petrol-prospektorado

Foto de CHEN FUSHENG

## SUR LA DORSKOVRILO:

Diino Luo (ĉinstila pentraĵo)  
de REN SHUAIYING

En la antikva ĉina mito estas bela diino, kiu nomiĝas Mi Fei. Foje ŝi dronis en la rivero Luo kaj poste fariĝis la diino de la rivero.

## KOLORAJ SERIOJ:

La Buji-oj  
Pejzaĝoj de la monto Putuo  
Fotaj faritaj de Esp-istoj  
Vaporumita anaso kun fungoj  
Bredata zibelo  
Latunaĵoj de Datong

## NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Petrolkampo kune ekspluatata de Ĉinio kaj Japanio en Bohai-mar  
En la 67-a Universala Kongreso

## Enhavo

Por krei novan situacion de socialisma konstruado . . . . .	12
Por la sano de la popolo . . . . .	2
Yexian — kunlabora centro establita de la Monda San-Organizaĵo . . . . .	5
Malvarmumo-preventa Gimnastiko . . . . .	9
NIA KULTIVEJO:	
Dum la tagoj en Antverpeno . . . . .	14
Esperanto — interligilo de amikeco . . . . .	16
ESP-NOVAĴOJ . . . . .	20
La petrolkampo Bohai en ekspluatado . . . . .	22
Bredado de dolĉakvaj fiŝoj en Ĉinio . . . . .	28
La "Geedzoj Curie" de Ĉinio . . . . .	32
Servemaj frizistinoj . . . . .	36
KURANTAJ AFEROJ . . . . .	19
MIA VIVO: Mi bredas cervojn . . . . .	38
En kaj ekster la malliberejo . . . . .	41
VIDINDAJ LOKOJ: Budhisma monto Putuo . . . . .	24
5 000 JAROJ DE ĈINIO: La fortikiĝo kaj disvolviĝo de la Okcidenta Han-dinastio . . . . .	44
EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: Fiŝkaptistoj sur la rivero Songhua . . . . .	46
Iom pri la monda malarmado . . . . .	50
TRA LA MONDO . . . . .	48
AMIKECO . . . . .	34
KORESPONDI DEZIRAS . . . . .	11

JARABONTARIFO	Belgio	BF	180.00	Finnlando	FMK	24.00	Italio	Lit	5200	Nederlando	Gld.	12.60	Portugalia	Esc	400		
Aŭstralio	\$A	5.70	FR Germanio	DM	10.80	Francio	FF	26.00	Japanio	Yen	1400	Nov-Zelando	NZ\$	6.70	Usono	US\$	6.00
Aŭstrio	Sch	80.00	Britio	£	3.00	Hispanio	Pts	600	Jugoslavio	Din.	180	Svisio	SF	10.00	Kanado	Can\$	7.20
Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 2.20 US\$ 4.30										Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 3.00 US\$ 6.00							



La aŭtoro

CUI YUELI\*:

# Por la sano de la popolo

## LA KURACA KAJ SANITARA SISTEMO EN LA URBOJ KAJ KAMPARO

Post la fondiĝo de la popola respubliko, la ŝtato persistis en la servo al la plejparto de la popolo en siaj kuracaj kaj sanitariaj laboroj kaj metis sian ĉefan atenton sur starigon kaj perfektigon de diversnivelaj kuracaj kaj sanitariaj organizaĵoj kaj kulturadon de tiuflankaj laborantoj. Nun, la centra registaro, provincoj, subprovincoj, urboj kaj gubernioj ĉiuj havas siajn kuracajn, higienajn, kontraŭepidemiajn organizaĵojn kaj tiujn por sanprotektado de virinoj kaj infanoj. En 1981, Ĉinio havis 66 000 hospitalojn kun 2 017 000 malsanulaj litoj, 3 200 diversnivelajn sanitariajn kaj kontraŭepidemiajn staciojn, pli ol 2 600 servojn por sanprotektado de virinoj kaj infanoj kaj 3 011 000 fakajn laborantojn.

La ĉina loĝantaro plejparte troviĝas en la kamparo, kie la

kuracaj kondiĉoj longtempe estis malbonaj, tial la tieaj kuracaj laboroj ĉiam estas atentataj de la popola registaro. Krom fortigi la guberniajn kuracajn kaj sanitariajn organizaĵojn, la ŝtato starigis ankaŭ hospitalojn ĝenerale en pli ol 54 000 popolaj komunumoj kaj kuracejojn en 85.4% de la produktaj brigadoj kun 1 396 000 kamparaj kuracistoj kaj 2 591 000 sanitaristoj kaj akuŝistinoj neapartigataj disde produkta laboro. Tiel formiĝis la kuraca kaj sanitara sistemo kun la gubernia kuraca kaj sanitara organizaĵo kiel la centro.

En la pasintaj pli ol 30 jaroj Ĉinio donis atenton al la disvolviĝo de la ĉina medicino. La ĉinaj medicino kaj farmacio estas valoraj kulturaj heredaĵoj de


---

\* La aŭtoro estas ministro de la Publika Sano de la Ĉina Popola Respubliko. Tiun ĉi artikolon li verkis laŭ la peto de nia redakcio.


**E**N la pasinta longa tempo la ĉina popolo troviĝis en senhelpa situacio dum malsano. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, la popola registaro ne nur alfrontis pezajn taskojn restarigi kaj disvolvi la nacian ekonomion, sed ankaŭ devis batali por bridi kaj elimini la furiozajn epidemiojn kaj plibonigi la kuracajn kaj sanitariajn kondiĉojn de la popolo.

Kiajn sukcesojn Ĉinio akiris en la kuracaj kaj higienaj laboroj en la pasintaj 33 jaroj?

Sanatorio de la termojnto  
Xifeng, Guizhou-provinco



Endoma mineralakva nuĝejo de la sanatorio





Ĉinio kaj multe kontribuis al la prosperiĝo de la ĉina nacio. Nun Ĉinio havas 781 ĉinmedicinajn hospitalojn kaj 289 000 ĉinmedicinajn kuracistojn. Ankaŭ multe progresis la kuraca afero en la nacimalplimultaj regionoj.

Dank' al la starigo de la urba kaj kampara kuraca sistemo, fundamente solviĝis la problemo de la popolo pri kuracado de malsanoj kaj bona bazo estis metita por plua disvolviĝo de la higiena afero.

### BRIDO KAJ ELIMINADO DE EPIDEMIOJ

Ĉinio prenas preventadon kiel la ĉefan principon en siaj kuracaj kaj sanitaraj laboroj. Ĝi faris amasan higienan movadon en la tuta lando kaj plimultigis sanitarajn instalaĵojn. Epidemioj kiel variolo, pesto, nigra febro, ripetanta febro, jam estis fundamente eliminitaj. Iuj vaste cirkulantaj malsanoj estis efike briditaj. Ekzemple, la nombro de suferantoj de skistosomozo cirkulanta en pli ol 340 gubernioj de 13 provincoj kaj aŭtonomaj regionoj en suda Ĉinio reduktiĝis de pli ol dek milionoj al 2.5 milionoj en la pasintaj dudek jaroj. La malario-suferantoj reduktiĝis de pli ol tridek milionoj antaŭ la Liberiĝo al pli ol tri milionoj. 95% de la loĝantaro en la regionoj de la loka strumo jam povas aĉeti jodan salon kaj proksimume dek milionoj da suferantoj jam resaniĝis. La malsanoj, kiel filariozo, Keshan-malsano, loka fluora toksigo kaj aliaj, kiuj cirkulis en vastaj regionoj en la pasinteco, estis certagrade briditaj. La efektivigo de plana imu-

*Kampana kuracistino en la Tibeta Aŭtonoma Regiono kuracas infanon.*




nigo kaj ĝeneraligo de la nova akuŝiga metodo multe reduktis la nombron de suferantoj de poliomyelito, morbilo, difterio, kokluŝo kaj tetano de novnaskitoj.

Dank' al la pliboniĝo de la materia kaj kultura vivo, rimarkinde pliboniĝis la sanstato de la ĉina popolo. La mortoprocento de la loĝantaro reduktiĝis de 2.5% antaŭ la Liberiĝo al 0.62%, tiu de la beboj reduktiĝis de ĉ. 20% al ĉ. 1.2% en la urboj kaj al ĉ. 2.5% en la kamparo. La meznombra vivdaŭro de la loĝantaro leviĝis de ĉ. 35 jaroj antaŭ la Liberiĝo al ĉ. 69 jaroj.

### FRUKTOJ DE LA ĈINA MEDICINO

En la pasintaj pli ol 30 jaroj la ĉina medicino multe progresis kaj akiris grandan nombron da scienc-esploraj fruktoj. Inter ili 335 objektoj gajnis la ŝtatan premion kaj iuj eĉ atingis aŭ proksimiĝis al la internacia avangarda nivelo, ekzemple, kuracado de grandarea profunda brulvundo, rekunigo de rompita membro, akupunktura anestezo, kuracado de akuta abdomena malsano kaj infekta malkaŝa ostrompiĝo per la ĉina kaj okciden-

*Taj-naciecaj kampanaj kuracistinoj en Yunnan-provincino ŝprucigas insekticidon por mortigi kulidojn.*



ta medicino en kombino, sukcesa provfarado kaj klinika uzado de vivaja korvalvo, sukcesa kulturo de epiderma kaj spindela ĉeloj de nazfaringa kancero, nova kontraŭ-malaria kuracilo — artemizia micino kaj nova kuracilo kontraŭ kronika grajnocela leŭkemio. Ankaŭ la aplikado de modernaj scienco kaj tekniko en esplorado de ĉinmedicina fundamenta teorio akiris novan progreson. Nun Ĉinio havas 285 medicinajn institutojn kaj koncernajn teknikajn institutojn kun pli ol 18 000 sciencaj laborantoj. Ankaŭ la ĉinaj medicinaj kolegioj, lernejoj kaj ĉefaj kuracejoj havas milojn da sciencaj laborantoj, kiuj samtempe faras sciencan esploron.


Ankaŭ nia medicina eduko disvolviĝas rapide kaj havas kompletan sistemon. Nun Ĉinio havas 112 medicinajn kaj farmaciajn kolegiojn kun 159 000 studentoj, 556 mezgradajn medicinajn kaj farmaciajn lernejojn kun 183 000 lernantoj kaj pli ol 1 200 elementajn higienajn lernejojn. Krome, Ĉinio energie faris progresigan medicinan edukon. Ĝi nun havas 118 landskallajn progresigajn medicinajn kursojn kaj pli ol 2 400 kursojn en superaj, mezgradaj medicinaj lernejoj, medicinaj esploraj institutoj kaj diversnivelaj higienaj organizaĵoj.

### LIMIGO DE LA LOĜANTARA KRESKO

La naskolimigo estas grava konsistiga parto de la higienaj laboroj de Ĉinio.

Ĉinio estas granda lando kun proksimume miliardo da loĝantoj, tial la limigo de la loĝantara

*Infanoj sane kreskas post elimino de skistosomozo en Yujiang-gubernio, Jiangxi-provinco.*



kresko estas aparte atentenda tasko. Nun Ĉinio praktikas naskolimigon en la tuta lando kaj pledas por tio, ke ĉiu paro da geedzoj nasku nur unu infanon. La higienaj organizaĵoj havas por tio pezajn taskojn. Niaj higienaj laborantoj propagandas al la vastaj popolamasoj kontraŭgravediĝon en naskolimigo kaj koncernajn sciojn, helpas naskopovajn geedzojn elekti konvenan kontraŭgravedan rimedon laŭ ilia konkreta stato kaj volo kaj faras teknikan direktadon kaj naskolimigan operacion. Por fari la operacion fidinda, la diversnivelaj higienaj organizaĵoj ĉiujare okazigas kurson por naskolimigaj teknikaj laborantoj. Dank' al la vasta farado de naskolimiga teknika direktado, la loĝantara kresko estas efike bridita. La natura naskokvanto de

la ĉina loĝantaro restis sub 1.2% en la pasintaj tri jaroj.

Krome, por disvolvi la amikecon kaj teknikan kunlaboron kun la popoloj de la tria mondo kaj subteni ilin en disvolvo de ilia kuraca kaj higiena afero, ekde 1963 Ĉinio invitive sendis al 41 aziaj kaj afrikaj landoj kaj regionoj kuracistajn taĉmentojn kun pli ol 6 200 personoj, kies kuracadon ricevis 55 milionoj da suferantoj de diversaj malsanoj. Nun ankoraŭ 34 kuracistaj taĉmentoj kun pli ol 1 100 personoj servas en 33 landoj.

Ĉinio estas disvolviĝanta lando. Kvankam ĝia kuraca kaj higiena afero akiris certan sukceson, tamen ĝi ankoraŭ ne povas plenumi la bezonon de la tuta ĉina popolo. Kaj pro tio ĝi devas fari ankoraŭ pli grandan klopodon por altigi sian kuracan nivelon.



## YEXIAN—KUNLABORA CENTRO ESTABLITA

### DE LA MONDA SAN-ORGANIZAĴO

**Y**EXIAN, gubernio en la nord-orienta parto de la duon-insulo Shandong, estas unu el la tri primaraj san-prizorgaj centroj establita de la Monda San-Organizaĵo en 1980, en Ĉinio. Por studi la sperton de tiu gubernio pri la primara kampara sanprotekto, la Monda San-Organizaĵo, la Disvolva Programo de UN, la Infana Fonduso de UN kaj la Monda Banko okazigis en junio, en tiu loko, la Interregionan Seminarion pri Primara San-prizorgo. Ĝin partoprenis sanprotektaj ministroj kaj administristoj kaj planadaj ministroj el dek kvin disvolviĝantaj landoj, inkluzive de Ĉinio. La seminario opiniis, ke la sperto de Yexian estas lerninda por la landoj de la tria mondo kaj ebligis al la tuta terglobo efektiviĝi la celon, ke ĉiu ekĝuos sanprotektadon en la jaro 2 000.

Kiel raportisto, mi ĉeestis la seminarion kaj havis ŝancon

viziti hospitalon en la gubernio, kiu impresis min per pureco kaj saneco.

#### MEDICINO SERVANTA AL KAMPARANOJ

Iun posttagmezon mi vizitis kune kun delegitoj la Popolan Hospitalon de Yexian. Ĝuste tiam oni operaciis por elpreni kalkuluson en la malsupra parto de la uretero de iu malsanulo. Oni lasis la tajlandan sanprotektan ministron rigardi la operacion. La ministro sin prezentis: “Mi estas membro de la Reĝa Medicina Asocio de Britio. Mi, kirurgo, praktikas la saman profesion kiel vi.” Post la operacio li laŭdis: “Vi faris la operacion lerte kaj rapide.” Respondeculo de la hospitalo diris al li, ke la juna kirurgo, kiu plenumis la operacion, finis sian studon en 1970 en la Medicina Instituto de Shandong.

Dum nia vizito la respondeculo diris al ni, ke la hospitalo kun areo de 34 800 kvadrataj metroj konsistas el ambulatorio, malsanulejo kaj loĝkvartalo por hospitalaj laborantoj. La malsanulejo konsistanta el teretaĝaj domoj havas 225 litojn. La ambulatorio lokiĝas en kvar-etaĝa domo kun areo de 6 000 kvadrataj metroj. Tie funkcias sekcio de internaj malsanoj, sekcioj de kirurgio, ginekologio, pediatrio, otorinolaringologio kaj stomatologio, sekcioj de kontaĝaj malsanoj kaj ĉina medicino. Kiel la gvida centro de kuracarto por la tuta gubernio, la hospitalo povas fari operaciojn por konstati kranian vundon, por desekci la mezan kaj malsupran partojn de kancera ezofago kaj por kuraci koran vundon.

La estro de la Gubernia Sanprotektata Buroo, nia akompananto, diris en kunsido, ke en la komenca periodo post la Liberiĝo la gubernio havis nur du malsanulejojn kun 55 simplaj litoj kaj 35 medicinistoj. Dum la pli ol tridek jaroj post la Liberiĝo la popola registaro iom post iom kompletigis la kurac-reton sur la niveloj gubernia, komunuma kaj brigada. Nun en la gubernio troviĝas 31 malsanulejoj sur la niveloj gubernia kaj komunuma, t.e. 15.5-oblo kiom ĉe la fondiĝo de la nova Ĉinio. Ili havas 1 001 litojn. Estas 1 010 sanprotektejoj sur la nivelo brigada. Laboras entute 446 medi-



*Eksterlanda gasto gustumas putakvon.*




*Kampana akuŝistino kaj infanoj, kiuj venis en la mondon helpe de ŝi*

cinistoj, kiuj finis sian studadon en mez- kaj altlernejoj. Krome, estas ankaŭ 2 122 lokaj vilaĝaj kuracistoj elkulturitaj de la gubernia hospitalo, komunumaj malsanulejoj kaj lernejoj pri higieno. Dank' al tiuj bonaj

kondiĉoj oni povas preventi malsanojn aŭ ricevi ĝustatempan kuracadon en proksima malsanulejo. 97% de la pacientoj povas akcepti ĝustatempan kuracadon en ambulatorio de komunuma aŭ brigada malsanulejo,

*Kampanoj ekuzis kranakvon.*



tiel ke malaperas iuj malsanoj kaj reduktiĝas la procentaĵo de iuj kontaĝaj malsanoj. Ekzemple, de 1974 neniu suferas difterion. La procentaĵo de malariuloj reduktiĝis de 0.39896% en 1970 al 0.0017% en 1981. Kaj la procentaĵo de morbiluloj reduktiĝis de 0.51977% en 1964 al 0.02339% en 1981.

Rilate al nasko, en 1981 oni akuŝigis per scienca metodo 99.7% de la gravedulinoj en la gubernio, kiuj devis akuŝi en tiu jaro. La procentaĵo de la mortnaskitoj estis nur 1.128%. Rimarkindan sukceson oni atingis en naskolimigo. La natura kresko de la loĝantaro reduktiĝis de 3.066% en 1963 al 0.807% en 1981. La viroj aĝas meznombro je 72.42 jaroj, kaj la virinoj je 77.26.

### **BONVENAJ LA VILAĜAJ KURACISTOJ KAJ KOOPERA KURACADO**

Iun agrablan sunan antaŭtagmezon ni veturis per aŭto al la produkta brigado Cailiang de la popola komunumo Guoxi. Nia aŭto kuris laŭ vojo ombrata de altaj poploj ĉe ambaŭ flankoj, eniris en vilaĝon kaj haltis apud la oficejo kaj sanprotektejo de la brigado.

En kunsido la brigadestro Cai Zuosen diris al ni, ke la brigado konsistas el tri produktaj taĉmentoj, kiuj havas 135 familiojn kun 529 homoj. Ilia po-kapa enspezo en 1981 estis 360 juanoj kaj ilia po-kapa grena porcio 310 kilogramoj. En la gubernio ili estas plimalpli bonhavaj. Por plibonigi iliajn higienajn kondiĉojn, la brigado asignis en 1969 monsumon al ebenigo de fetora fosaĵo, sur kies bazo oni konstruis ter-etaĝan brikan domon kun kvin ĉambroj por sanprotektejo.



tejo kaj starigis grandan kaldronon por senpage doni akvon al la vilaĝanoj. Krome oni ankaŭ boris por ĉiu familio puton kun pumpilo kaj transformis ĉies necesojn. La brigado efektivigis kooperan kuracadon, kurac-sistemon kun karaktero de kolektiva bonstatigo ĝenerale praktikatan en la ĉina kamparo. Oni starigas fonduson amasigitan laŭ principo de libera volo kaj reciproka utilo. La brigado fiksas la jaran kurackoston de ĉiu vilaĝano je 3.5 juanoj, t.e. ĝi sin ŝarĝas per tri juanoj kaj la malsanulon per 0.5. La grave malsanaj vilaĝanoj ricevas kuracon en malsanulejo de la komunumo aŭ la gubernio. La brigado pagas al ili la tutan kurackoston, se tio ne superas 80 juanojn. Sed ili mem devas pagi la diferencon. La malriĉaj malsanuloj povas ne pagi la diferencon aŭ ricevas iom da monhelpo. Tiel la vilaĝanoj havas garantion ricevi kuracon.

Post la kunsido ni pririgardis la sanprotektejon de la brigado. Ĝia estro Liang Mingjie, mezaĝulo kun pli-ol-20-jara sperto pri sanprotektado, partoprenis

kursojn pri interna medicino kaj anatomio dum du jaroj kaj provlaboris en la gubernia hospitalo dum duonjaro. Nun li prizorgas ĉiujn laborojn de la sanprotektejo kaj ambulatorio. Li oficas en domo el du ĉambroj: unu destinita por akcepti malsanulojn kaj la alia por kuraci iliajn malsanojn. Sur muroj de la unua pendas vico da registraĵoj pri malsanoj kaj tabelo pri prevento de oftaj lokaj malsanoj.

En la sanprotektejo laboras ankaŭ du junaj vilaĝaj medicinistoj. Unu prizorgas la sanon de virinoj kaj naskolimigon, dum la alia la apotekon kaj laboratorion. Antaŭe ili vizitis la gubernian lernejon pri higieno dum unu jaro kaj provlaboris en la komunuma malsanulejo. En la komenco de tiu ĉi jaro oni ekzamenis ilin kaj donis al ili po unu diplomon pri vilaĝa kuracisto.

En la obstetrika sekcio estas esplorlito kaj akuŝlito. Ĉe angulo de la ĉambro estas sterilizatoro. Sur muro pendas bildo pri akuŝigo per scienca metodo.

La vilaĝa akuŝistino Niu Shumin prezentis al ni sian laboron. Ŝi diris, ke ŝi eklaboris en 1975 kaj akuŝigis pli ol 80 virinojn per scienca sterilizita metodo. Iliaj beboj estas sanaj kaj viglaj. Iuj el ili vizitas infanĝardenon dum aliaj jam elementan lernejon.

En vitra ŝranko de la apoteko estas 119 specoj de okcidentaj medikamentoj. En la tirkestetoj de granda ĉin-stila ligna ŝranko estas 128 specoj de herbodrogoj, ĉiu kun etiketo ĉe tirkesto.

Ĉiujare la medicinistoj praktikas sian okupon ok monatojn kaj dediĉas kvar monatojn al kamplaboro. La brigado donas al ili laborpoentojn egalajn al responda kamparana laborforto. En 1981 Liang Mingjie ricevis 4 000 poentojn. Laŭ la jarfina kalkulo de la brigado, oni transformis en 1.8 juanojn ĉiun dekon da poentoj akireblan en unu norma labortago. En tiu jaro li ricevis 600 juanojn post dealkulo de 120 juanoj por la jara porcio da greno kaj legomoj.



Strato en Xujia-komunumo

Kampananoj ĝoje diris al mi: “La vilaĝaj kuracistoj estas vivteneblaj, bezonataj kaj netranspostenigitaj. Estas tre oportune, ke ni ricevas kuracadon sen eliri el la vilaĝo.”

### KAMPARANOJ EKHAVIS HIGIENAJN KUTIMOJN

Plej profunde min impresis tio, ke kampananoj tenas sian vilaĝon en pura stato dank’ al la disvolviĝo de la agrikulturo kaj pliboniĝo de la vivo. La kadroj sur la baza nivelo mobilizis kaj organizis la kampananojn por kombini la sanprotektadon kun beligo de la medio, kio jam rikoltis rimarkindan efikon.

Mi venis al larĝa pura strato de la produkta brigado Heya en la komunumo Xujia. Ĉe stratfino staras ligna tabulo kun la strata nomo “Junulo”. Antaŭe en tiu loko estis du larĝaj fosajoj kaj unu akvejo kun areo de iom pli ol 0.2 hektaro, kiujn vilaĝaj junuloj ebenigis por konstrui straton. La nova strato larĝas dek kvar metrojn, kun

kloaka kanalo. La uruŝioj ambaŭflanke de la strato kreskis jam ĝis la alteco de homo. Mi promene iris en la korton de iu kampanano, kie kreskas pirarbo kaj pomarbo kun junaj fruktoj. Antaŭ la domo kaj ekranmuro parfumis rozoj, jasmenoj kaj sovaĝpomoj. En la pura domo estis terlito kun desegnitaj vattitaj litkovriloj bonorde unu sur alia. Oni inverse metis ĉiujn vazojn kaj potojn en la korto por malebligi la generadon de moskitoj kaj muŝoj en malpura akvo. La sanprotektejo de la vilaĝo lokiĝas en la centro de la loĝkvartalo, en la meza parto de la strato. La brigado konstruis la stalojn de porkoj kaj aliaj brutoj kaj la traktoro-remizon en lokoj, al kiuj blovas vento, 80-150 metrojn for de la loĝkvartalo, por redukti polucion al la vivo de la vilaĝanoj.

Poste mi venis al la brigado Xiaohan en la sama komunumo. Min altiris alta akvoturo ĉe vilaĝfino. Mi alproksimiĝis kaj vidis tra kortpordo ŝtonplaton kun la ruĝaj vortoj “Dolĉakva

Fonto” en la mezo de florbedo. La akvoturon kun kapacito de tridek ses kubmetroj oni konstruis en 1977, samtempe kun novaj loĝdomoj. Post la starigo de la hermetika turo oni instalas akvotubojn al la 422 familioj de la vilaĝo. Post esploro oni konstatis, ke la trinkakvo jam atingis la normon difinitan de la ŝtato. Antaŭe la vilaĝanoj trinkis salan akvon. Nun ili havas puran dolĉan akvon ne nur por trinki, sed eĉ por sin bani.

En la sterkejo de la brigado Cailiang en la komunumo Guoxi ni vidis neniun muŝon aŭ vermon, flaris nenian malbonodoron. Maljuna sterkisto diris, ke ĉiun antaŭtagmezon la sterkistoj de la produktaj taĉmentoj transportas tien fekajon el ĉiuj domoj kaj publikaj necesejoj kaj li tuj plene kovras la fekajon per koto por teni ĝin hermetike. Li okupiĝis pri tiu laboro jam 24 jarojn. Mi demandis lin, kial li ne abomenas la malpuraĵon. Li respondis ridetante: “Ĉar tia laboro helpas al la homa sano kaj plimultigo de greno.”



### Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

Pekina Tempo	GMT	Al Regionoj	Ondoj (m)	kHz
4:00-4:30	20:00-20:30	Eŭropo	30.1	9965
			26.2	11445
			19.8	15150
6:30-7:00	22:30-23:00	Latin-Ameriko	26.0	11515
			19.7	15165
19:00-19:30	11:00-11:30	Japanio, Koreio	30.4	9860
			19.8	15100
21:00-21:30	13:00-13:30	Sudorienta Azio	19.7	15165
			16.9	17745



# Malvarmumo-preventa Gimnastiko

VINTRE homoj facile malvarmumiĝas de frosto. Por tion preventi oni povas sin ekzerci per la ĉina malvarmumo-preventa gimnastiko.

Ĝi estis kompilita kune de kuracistoj kaj instruistoj. Vintre de 1974 ĝi estis eksperimentata inter lernantoj de la mez- kaj element-lernejoj de la urbo Xinxiang en Henan-provinco. El 5 640 ekzercantoj de la gimnastiko malvarmumiĝis nur 8.3% kaj el 5 843 neekzercantoj 11.8%. samtempe kun tio, oni faris la saman eksperimentadon en aliaj ses urboj de la provinco. El 2 917 ekzercantoj de la gimnastiko malvarmumiĝis 7.74% kaj el 3 065 neekzercantoj 16.35%.

En la jaro 1975 la gazeto "Sportaj Novajoj" kaj la Ĉina Centra Televidstacio sinsekve prezentis la malvarmumo-preventan gimnastikon, kio ricevis varman aprobon.

La gimnastiko konsistas el frotado de neŝirmitaj korpopartoj, masaĝado kaj batado de akupunkturaj punktoj kaj gimnastikaj movoj. Masaĝado de akupunkturaj punktoj estas kuraca rimedo de la ĉina medicino. Masaĝado de la akupunkturaj punktoj elektitaj por la gimnastiko povas preventi malvarmumon, kuraci naztruan obstrukcon, nazkataron kaj febron. Oftaj masaĝado kaj batado de certaj tiaj punktoj povas sanigi la korpon kaj preventi malvarmumon.

En la komenco la ekzercanto devas dufoje fari ok paŝojn en la sama loko.

I. Frotado de la manoj (dufoje ok movoj)

La starta pozicio: Stari rekte kun la kruroj etenditaj sur la vertikalaj de la ŝultraj flankoj.

Movoj:

1. Levi la brakojn ĝis la brusto kun natura kubuta kurbiĝo, iom kurbigi la manplatojn, forte premi la maldekstran manplaton al la dekstra mandorso, movi la maldekstran manon suben kaj internen kaj la dekstran manon supren kaj eksteren ĝis la dekstra manplato estas forte premita al la maldekstra mandorso.

2. Movi la maldekstran manon supren kaj eksteren kaj la dekstran manon suben kaj internen, ĝis la maldekstra manplato estas forte premita al la dekstra mandorso.

3, 5, 7. Ripeti la movojn de 1.

4, 6, 8. Ripeti la movojn de 2.

Je la lasta oka movo la ekzercanto devas repreni la startan pozicion.

II. Frotado de la vizaĝo (dufoje ok movoj)

La starta pozicio estas la sama kiel tiu de I.

Movoj:

1. Kurbigi la kubutojn, kunigi la fingrojn kaj meti la longajn fingrojn flanken de la nazo,

froti la vizaĝon de tie ĝis la frunta hararo, movi la manplatojn eksteren kaj suben laŭ la hararo ĝis la mentono kaj supren ĝis la nazaj flankoj.

2, 3, 4, 5, 6, 7, 8. Ripeti la movojn de 1.

Je la lasta oka movo la ekzercanto devas repreni la startan pozicion.

III. Frotado de la kolo (dufoje ok movoj)

La starta pozicio estas la sama kiel tiu de I.

Movoj:

1. Kurbigi la kubutojn, kunigi la fingrojn, meti la manplatojn sur la du flankoj de la kolo kaj froti ĝin antaŭen kaj malantaŭen.

2, 3, 4, 5, 6, 7, 8. Ripeti la movojn de 1.

Je la lasta oka movo la ekzercanto devas repreni la startan pozicion.

Postulo: Dum la frotado de la manoj, vizaĝo kaj kolo, la manplatoj tiel forte frotu la koncernajn partojn, ke la ekzercanto sentas varmon.

IV. Brusto-ekspansiiga ekzerco (dufoje ok movoj)


La starta pozicio estas la sama kiel tiu de I.

Movoj:

1. Duon-pugnigi la manojn kun la mandorsoj supren, kurbigi la brakojn horizontale antaŭ la brusto kaj forte svingi ilin malantaŭen.

2. Refoje svingi la brakojn malantaŭen.

3. Levi la brakojn horizontale antaŭen kun la mandorsoj malsupren kaj forte svingi ilin flanken kaj malantaŭen.



4. Refoje svingi la brakojn flanken kaj malantaŭen.

5, 6. Ripeti la movojn de 1, 2.

7, 8. Ripeti la movojn de 3, 4.

Je la lasta oka movo la ekzercanto devas repreni la startan pozicion.

V. Masaĝado de la akupunkturaj punktoj Jinghiang (kvarfoje ok movoj)

La starta pozicio estas la sama kiel tiu de I.

Movoj:

1. Duon-pugnigi la manojn, premi la akupunkturajn punktojn Jinghiang per la montraj fingroj kaj turni la fingrojn eksteren kaj internen.

2, 3, 4, 5, 6, 7, 8. Ripeti la movojn de 1.

Je la lasta oka movo la ekzercanto devas repreni la startan pozicion.

VI. Masaĝado de la akupunkturaj punktoj Fengĉi (kvarfoje ok movoj)

La starta pozicio estas la sama kiel tiu de I.

Movoj:

1. Kurbigi la kubutojn, kuniĝi la fingrojn, premi la akupunkturajn punktojn Fengĉi per la fingroj montraj, longaj kaj ringaj kaj turni la fingrojn eksteren kaj internen.

2, 3, 4, 5, 6, 7, 8. Ripeti la movojn de 1.

Je la lasta oka movo la ekzercanto devas retiri la maldekstran piedon kaj stari rekte.

Postulo: La masaĝado de la akupunkturaj punktoj Jinghiang kaj Fengĉi postulas, ke la ekzercanto precize trovu ilin. La akupunkturaj punktoj Jinghiang troviĝas en la sulkoj inter nazloboj kaj vangoj, kaj la akupunkturaj punktoj Fengĉi troviĝas flanke de la nuko en la hararo (vd. la bildon). La turnoamplekso estu ne tro granda sed tiel forta, ke la ekzercanto sentu doloron kaj pezecon.

VII. Batado de la akupunkturaj punktoj Zusanli (kvarfoje ok movoj)

La starta pozicio: en pozicio de rekta staro.

Movoj:

1. Movi la maldekstran pie-

don maldekstren unu paŝon, por ke la piedoj staru sur la vertikaloj de la ŝultraj flankoj, levi la etenditajn brakojn antaŭen kaj oblikve supren kun la manplatoj antaŭen.

2. Klini la korpon antaŭen kaj tuŝi grundon per la fingropintoj.

3. Ripeti la movojn de 2.

4. Pugnigi la manojn kaj bati la akupunkturajn punktojn Zusanli de la maldekstra kruro per la svingiĝanta maldekstra pugno, la dekstra brako nature svingiĝas iom supren.

5. Bati la akupunkturajn punktojn Zusanli de la dekstra kruro per la svingiĝanta dekstra pugno, la maldekstra brako nature svingiĝas iom supren.


6. Ripeti la movojn de 4.

7. Ripeti la movojn de 5.

8. Repreni la pozicion de rekta staro.

Rimarko: La duan fojon la ekzercanto devas unue movi la dekstran piedon kaj bati la dekstran kruron. La trian fojon la ekzercanto ripetu la movojn





de la unua fojo kaj la kvaran fojon la movojn de la dua fojo.

Postulo: La bato de la akupunkturaj punktoj Zusanli precize trafu la akupunkturpunkton. Ĝi estas ekstere flanke de genuo, je 10 cm. malsupre de ĝi (vd. la bildon).

VIII. Finaj movoj (dufoje ok movoj)

La starta pozicio: en pozicio de rekta staro.

Movoj:

1. Duon-pugnigi la manojn, levi la etenditajn brakojn flanken horizontale kaj samtempe la malstreĉitan, maldekstran kruron je 45 gradoj.

2. Mallevi la maldekstran kruron kaj krucigi la manojn antaŭ la ventro.


3. Ripeti la movojn de 1, sed levi la dekstran kruron anstataŭe.

4. Ripeti la movojn de 2.

5, 6, 7, 8. Ripeti la movojn de 1, 2, 3, 4.

Je la lasta oka movo la ekzercanto devas repreni la pozicion de rekta staro.

Postulo: La finaj movoj postulas, ke la ekzercanto malstreĉu la muskolojn kaj faru la movojn harmonie; kviete spiru per la nazo.



### KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

- \* Clement Payan, 05500 St. Bonnet, Francio, dez. kor. kun ĉinoj pri alpaj papilionoj.
- \* Brazilaj esp-istoj volonte kor. kun ĉinaj s-anoj pri ĉiuj temoj. Adr.: Acesita Esperanto-Klubo, Caixa Postal 192, 35180 Acesita-MG, Brazilo.
- \* 10-jara hungara knabino Barbara Hajas, serĉas korespondamikinojn 10-12 jarajn. Adr.: Szombathely, Baratsag u. 15. I. 6, H-9700, Hungario.
- \* F-ino Simone Hervot, 29-j., sekretariino, 4 bis, Rue Pierre

Loti, 35000 Rennes, Francio, deziras korespondi kaj amikiĝi kun geesperantistoj tutmondaj pri ĉiuj temoj. Hobioj: poŝtmarkoj, bildkartoj, muziko, revuoj, k.a.

- \* Mi serĉas memorigajn poŝtstampojn, malnovajn kaj estontajn, pri Esperanto kaj fervojo de ĉiuj landoj, ankaŭ grandkvante. A. Neussner, D-1 Berlin 62, Dominicusstr. 25, Germanio.
- \* Societaj membroj deziras gekorespondantojn tra la tuta mondo. Internacia Societo de Amikeco kaj Bonvolo, Box 756, Shelby, N.C. 28150 U.S.A.

# POR KREI NOVAN SITUACION DE SOCIALISMA KONSTRUADO

Kiel politika partio en potenco, la Komunista Partio de Ĉinio okazigis sian 12-an Tutlandan Kongreson de la 1-a ĝis la 11-a de septembro 1982 en Pekino.


Deng Xiaoping faris inaŭguran paroladon en la kongreso. Li elmetis al la 1 600 reprezentantoj tri ĉefajn taskojn plenumendajn por la Partio kaj la ŝtato en la okdekaj jaroj: intensigi la socialisman modernigan konstruadon, strebi por reunuigi la patrujon, precipe por revenigi Taiwan, kaj kontraŭbatali hegemoniismon kaj defendi la mondacon. El la tri taskoj la ekonomia konstruado estas la kerno.

En la nomo de la 11-a Centra Komitato de la Komu-

nista Partio de Ĉinio, Hu Yaobang faris raporton al la kongreso sub la titolo "Krei Novan Situacion en Ĉiuj Kampoj de Socialisma Modernigado", en kiu li diris, ke la ĝenerala tasko de la Komunista Partio de Ĉinio en la nova historia periodo estas modernigi industrion, agrikulturon, nacian defendon, sciencojn kaj teknikojn, kaj konstrui Ĉinion en socialisman landon kun alta civilizacio kaj alta demokratio. Li deklaris, ke en la 20 jaroj de 1981 ĝis la fino de tiu ĉi jarcento la ĝenerala celo de la ĉina ekonomia konstruado estas strebi por kvarobligi la totalan jaran produktovaloron de industrio kaj agrikulturo, t.e. levi ĝin de 710 miliardoj da juanoj\* en la jaro 1980 al 2 800 mili-

ardoj da juanoj en la jaro 2000. Li montris, ke laborante por alta nivelo de materia civilizacio, Ĉinio devas ankaŭ strebi por alta nivelo de socialisma spirita civilizacio. Rilate la eksteran politikon de Ĉinio, li diris, ke Ĉinio neniam dependos de iu ajn potenco aŭ grupo de ŝtatoj kaj neniam submetiĝos al premo de iu ajn potenco. Li emfazis denove, ke Ĉinio sensanceliĝe staros ĉe la flanko de la landoj de la tria mondo por batali kontraŭ imperiismo, hegemoniismo kaj koloniismo.

La kongreso aprobis la novan Statuton de la Komunista Partio de Ĉinio, kiu faris gravan ŝanĝon al la sistemo de la centra kaj lokaj organizoj de la Partio kaj prezentis



*Reprezentantoj diskutas pri dokumentoj de la kongreso.*





*Kamaradoj Hu Yaobang, Deng Xiaoping kaj Zhao Ziyang (de dekstre en la fronta vico) sur la podio*

pli rigorajn postulojn al la partiaj membroj kaj gvidantoj.

La kongreso elektis la novan Centran Komitaton de la Partio, la Centran Konsilan Komisionon kaj la Centran Komisionon por Kontrolo de Disciplino. Ĝi fermiĝis an-

taŭtagmeze de la 11-a de septembro.

La Unua Plena Sesio de la 12-a Centra Komitato, kiu okazis post la kongreso, elektis la Politikan Buroon de la Centra Komitato kaj Hu Yaobang kiel ĝeneralan sekretario. La Unua Plena Sesio de

la Centra Konsila Komisiono elektis Deng Xiaoping kiel prezidanton. La Unua Plena Sesio de la Centra Komisiono por Kontrolo de Disciplino elektis Chen Yun kiel la unuan sekretarion.

*\* Juano estas ĉina monunuo. Unu juano egalas al 0.52 usona dolaro.*



*Reprezentantoj eliras el la kunvenejo post la fermiĝo de la kongreso.*



## Dum la tagoj en Antverpeno

**L**A 21-an de julio, frumatene, Ĉina Esperanto-delegacio kaj raportisto de Radio Pekino, sume sep personoj, forflugis de Pekino al Antverpeno, la fama havenurbo en Belgio, por partopreni en la 67-a Universala Kongreso de Esperanto.

Antaŭ 71 jaroj, ĝuste en tiu ĉi urbo, okazis la 7-a UK. D-ro Zamenhof persone ĉeestis tiun kongreson kaj faris gravan paroladon, en kiu li faris proponon pri "Rajtigitaj Delegitoj". Kaj dank' al tio efektiviĝis la deziro pri establo de internacia organizaĵo de esperantistoj. En 1928 en tiu urbo oni okazigis la 20-an UK, kiun ĉeestis Hujucz, la nuna

prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo.

La ĉi-foja UK estas la tria, kiu estis okazigita en Antverpeno, fame konata tra la mondo por sia diamanto-industrio. Iu belga amiko asertis, ke la 67-a UK estas plia brilanta diamanto, kiu ornamas Antverpenon.

Antverpeno estas ne nur antikva urbo kun agrabla klimato kaj belaj pejzaĝoj, sed ankaŭ urbo kun civilizacio kaj gastamo. Ĵus kiam ni atingis la urbon, ĉio por ni estis fremda. Tamen dank' al la helpo de belgaj amikoj, ni al kutimiĝis al la nekonata medio sufiĉe rapide.

Foje, survoje al la kongresejo renkonte venis al mi maljunulino, kiu kapsalutis min kaj ekparolis kun mi. Ne komprenante kion ŝi diris, mi maltrankviliĝis. Ĝuste en tiu momento venis al ni iu loka esperantisto. Li memvole servis kiel nia interpretanto. Dank' al lia helpo mi sciigis, ke la maljunulino tre ĝojas renkonti gaston el Ĉinio. Ŝi deziris, ke ni ĉinoj restu pli longe en Antverpeno, kaj proponis al mi kelkajn vidindaĵojn. Kaj mi esprimis mian dankon al ŝi pro ŝia bonkoreco. La interpretanto diris al mi, ke de la lastaj jaroj belgoj pli kaj pli multe konas Ĉinion. Nemalmultaj interesiĝas pri la ĉina lingvo. Multaj belgoj, same kiel tiu maljunulino, havas amikecon por Ĉinio. Li diris plie, ke la antverpenanoj tre ĝojas, ke oni okazigas la 67-an UK de Esperanto en ilia urbo.

La 25-an de julio oni solene inaŭguris la kongreson. Ĝin ĉeestis 1 899 esperantistoj el 50 landoj, kio estas rekorda nombro post 1979. Estas ĝojinde, ke inter la ĉeestantoj estis ankaŭ esperantistoj el Hindio kaj Madagaskaro. Antaŭtagmeze la delegitoj de 14 diplomaciaj misioj salutis la kongreson. Ĉeestis la inaŭguron ankaŭ la unua sekretario de la ĉina ambasadorejo al Belgio. Posttagmeze, la reprezentantoj de diverslandaj Esperanto-organizaĵoj salutis la kongre-

*La aŭtoro Xu Senrong (la dua de dekstre)*





son. La saluto de Zhang Qicheng, ĝenerala sekretario de ĈEL, ricevis varman aplaŭdon.

Post la inaŭguro komenciĝis diversaj kunvenoj de fakaj asocioj, diskutoj pri la kongresa temo — “Generaciaj Aspektoj de Esperanto”, prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato, Esperantologia Konferenco kaj abundaj amuzaj prezentaĵoj kaj teatraĵoj. La UK daŭris ses tagojn. Dum tiuj tagoj la totala nombro de diversaj kunvenoj, aktivadoj kaj prezentaĵoj atingis pli ol 140. Frontante al tiel abundaj kaj enhavoriĉaj aktivadoj, ni devis elekti nur kelkajn por ĉeesti, kvankam ni volis ĉeesti ĉiujn.

Ĉe la kongreso, profesoro Io Chou, membro de nia delegacio, faris prelegon en la Internacia Kongresa Universitato. Dum pli-ol-unu-hora prelego, kun helpo de projekciado de lumbildoj, li koncize prezentis al la aŭskultantoj la historion pri la utiligo de insektoj kaj prevento de fiinsektoj en Ĉinio kaj la atingojn tiurilatajn en la lastaj jaroj. La prelego vekis grandan intereson ĉe la ĉeestantoj.

Sur la podio de la Internacia Kongresa Universitato dek fakuloj faris prelegojn, kiuj koncerne zoologion, botanikon, entomologion, muzeologion, psikologion de la infanoj, patologion, mekanikon, literaturon k. a. Ĉiuj prelegoj estis bonvenigitaj de aŭskultantoj. Nun pli kaj pli multiĝas esperantistoj, kiuj bone scias la gravecon de enkonduko de Esperanto sur la scienc-teknikan kampon. Des pli gravas por la popolo de la tria mondo, ke pere de Esperanto oni povas pli facile lerni de aliaj landoj avangardajn sciencojn kaj teknikojn

kaj apliki ilin por disvolvi industrion kaj agrikulturon de sia lando. Samtempe la plivastigo de la uzo de la lingvo sur la scienc-teknika kampo reage akcelas la Esperanto-movadon en la koncernaj landoj.

La plej juna membro de nia delegacio, kantistino Qiu Zimin, kantis Esperante kelkajn ĉinajn kantojn, kio gajnis varman aplaŭdon de la aŭskultantoj. Jugoslavaj amikinoj speciale aĉetis florbukedon kiel donacon por gratuli ŝin pro ŝia sukcesa prezentado.

Muzikaj prezentaĵoj kaj teatraĵoj dum la kongreso estis riĉaj kaj variaj. Sume estis 12 specoj de prezentaĵoj. Ĉiutage oni prezentis almenaŭ unu, iam eĉ tri prezentaĵojn. Troviĝis kvar teatraĵoj, el kiuj la ĉefa estis “Ĉu vi vidis jam la piedsignon de 1’ profeto” kiu estis prezentita de hungaraj profesiaj aktoroj. Ankaŭ prezentis pupateatro el Hindio.

Estas aparte menciinde, ke Radio Pekino unuafoje sendis raportiston Liu Junfang al la kongreso. Li faris intervjuojn en diversaj kunvenoj. Kaj apartaj intervjuoj estis aranĝitaj por la fama esperantisto kaj fakulo Tibor Sekelj kaj la redaktoro de “Esperanto” Simo Milojevic. Li okazigis ankaŭ kunsidon de aŭskultantoj de Radio Pekino por kolekti opiniojn kaj proponojn.

Dum la kongreso ni ofte vidis la jenon: iu esperantisto, renkontiĝinte kun ni, anstataŭ prezenti sian nomon, diras “Mi estas abonanto de via gazeto ‘El Popola Ĉinio’”, “Mi estas peranto de EPC” aŭ “Mi estas aŭskultanto de Radio Pekino”. Tiuj vortoj proksimigis nin, kaj sentigis al ni



*Ite Tytgat, voĝvidisto de la Ĉina Esperanto-Delegacio dum la vizito en Lier*

intimecon, kvazaŭ malnovaj amikoj hazarde renkontiĝas eksterlande.

Niaj Esperantaj eldonaĵoj estas ŝatataj de la vasta esperantistaro. Nemalmultaj personoj bingis EPC ĵarkolekte por longa konservo. Iuj prenas niajn infanlibrojn kiel lernolibrojn por komencantoj. Kaj ankaŭ iuj esperantaj grupoj regule faras diskutadon pri artikoloj aperintaj en EPC. Ni konatiĝis ankaŭ kun paro da esperantistoj el FR Germanio, kiuj prenas aŭskultadon de Radio Pekino kiel farendan aferon en la ĉiutaga vivo. Se la edzo ne estas hejme, la edzino surbendigas la programon, por ke la edzo aŭskultu hejmenreveninte. Ilia familio havas regulon, ke en la tempo por aŭskultiti Radion Pekino, ĉiuj aliaj afe-

roj devas esti ĉesigitaj, eĉ kiam ĉeestas gastoj. Ankaŭ estis blindulo-esperantisto, kiu devenas de Pollando. Li volis renkontiĝi kun nia delegacia estro Zhang Qicheng, dirante, ke estos granda feliĉo por li, se li havos honoron interparoli kun la ĉefredaktoro de EPC. Ricevinte EPC, lia edzino ĉiufoje legas por li artikolojn el ĝi unu post alia por plenumi lian ardan deziron koni Ĉinion.

Ĉi tie mi volus mencii, ke niaj infanlibroj estas vaste bonvenigataj. Oni laŭdas, ke ili estas instruaj, bele presitaj kaj malmultekostaj. En la kongreso la ĉina infanlibro "Pesi Elefanton" gajnis infanlibran premion de 1981.

Kiam ni vidas, ke niaj eldonaĵoj kaj radiodisaŭdigo havas tiel bonan efikon en plifortigo de amikeco inter la ĉina popolo kaj la popolo de la aliaj landoj kaj en prosperiĝo de la Esperanto-movado, ni sentas koran ĝojon. Por ne malesperigi niajn fervorajn legantojn kaj aŭskultantojn, ni devas ankoraŭ pli bone fari niajn eldonan laboron kaj disaŭdigadon.



ZHOU LI\*:

## Esperanto — interligilo

EN 1933 mi estis diplomita de mezlernejo en Tianjin kaj ripozis hejme pro malsano. Tiam mia onklino longe suferis de ventroŝveliĝo kvankam longe kuracate. Amiko de mia onklo rekomendis al ŝi japanon kiu kuracis per spira gimnastiko. Kiel interpretanto mi havis la okazon konatiĝi kun li, gvidanto de la nordĉinia filio de Oomoto. Poste li invitis min al lia oficejo. Tie mi konatiĝis kun s-ro Hiraki Rjujiro\*\*. Li konigis al mi Esperanton, donacis al mi maldikan malgrandan lernolibron kaj promesis instrui al mi Esperanton, se mi volas.

Instigite de lia informo mi ekpensis: "Ĉu ne estos pli oportune, se homoj el diversaj landoj interkomprenas pere de unu komuna lingvo? Se Esperanto ludos vere tiun rolon, ĝi estos lerninda." Mi eklernis ĝin kaj post du semajnoj mi jam finis la libreton.

Nelonge poste li prezentis al mi germanan esperantiston dentiston Karl Maier. En la aĝo de pli ol 30 jaroj li montris sin afabla kaj modesta. Kiam ni unuafoje intervidiĝis, ni firme manpremis unu al la alia, kaj mi diris Esperante: "Bonan vesperon. Mi estas ĝoja vin vidi!" Li salutis min per ĝoja rideto.

Tiutempe s-ro Hiraki interkonsiliĝis kun mi pri fondo de Esperanto-kurso, ke li varbos kursanojn kaj mi instruos. La kurso el dekelke da membroj lernis trifoje semajne kaj post

unu monato finis la libreton. Estis bedaŭre, ke la kursanoj ne multe rikoltis pro mia sensper-teco.

Printempe de 1934 mi venis al Japanio. El gazeto mi informiĝis, ke Oomoto estis malpermesita pro sia "aŭdaca malrespekto al la mikado". De tiam mi ricevis nenian informon pri s-ro Hiraki.

En Japanio mi trapasis la ekzamenon por eniri la Altan Komercan Lernejon de Nagasako.

En la urbo Nagasako troviĝis filio de la Japana Esperanto-Instituto. Ĝia estro estis s-ro Takahara Akira. Li estis kuracisto kaj dum tri jaroj de mia restado en la urbo mi ofte vizitis lin pro malsano, kaj li neniam postulis de mi pagon. Ĝia vices-tro Ueda Kozeo estis profesoro de la farmakologia fakto de la Medicina Instituto de Nagasako. Li ofte organizis prelegan kunvenon. Oni ĉiufoje estis komisiita prepari Esperantan artikolon por klarigi ĝin laŭvice en la kunveno. Mi ĉeestis kelkfoje tian kunvenon. D-ro Takahara Akira kaj profesoro Ueda Kozeo ambaŭ parolis Esperanton tre flue. La sekretario de la filio estis Tomimacu, kiu tiam okupis sin pri preparado de la Japana Esperantista Kongreso okazigota en Nagasako. Kaj, invitite, mi partoprenis en la preparado.

La Japana Esperantista Kongreso akurate malfermiĝis. Kiel ĉina esperantisto mi varme salu-



## de amikeco

tis la kongreson. En ĝi mi konatiĝis kun multaj famaj esperantistoj, iuj el kiuj ankoraŭ aktivis hodiaŭ. Plej profunde impresis min Kubo Tejiro kaj Isobe Yukiko, kiuj tiam aĝis malpli ol 30 jarojn. Kvankam dum la pasintaj dekoj da jaroj mi ne havis la ŝancon revidi ilin, tamen mi ĉiam tenis en mia memoro tiujn entuziasmajn japanajn esperantistojn.

Marte de 1937 mi revenis al Tianjin kaj baldaŭ renkontis s-ron Karl Maier. Poste mi laboris en privata banko, kontraŭ kiu troviĝis lia loĝejo, tial oftigis niaj kontaktoj. Tiam mi havis la deziron daŭre lerni la rusan lingvon kaj pro tio li rekomendis al mi belorusan instruistino. Kaj mi komencis lerni en lia gastoĉambro. Mi tenis bonajn interrilatojn kun la geedzoj Maier. Kelkiam mi akompanis ilin al restoracio, kie ili ĝuis ŝatatajn ĉinajn pladojn. Ili siavice tre zorgis pri mi. Foje pro karia dento mi vizitis s-ron Maier. Li faris por mi dufojan kuracon kaj rifuzis mian pagon. Kaj ĝis nun la dento bone funkcias.

La 7-an de julio 1937 eksplodis la Kontraŭjapana Rezistmilito. Multaj gejunuloj perdis sian laboron aŭ lernadon. Por helpi ilin mi interkonsiliĝis kun mia progresema kolego pri fondo de Esperanto-kurso. Ni luprenis ĉambron de la Junulina Societo kiel klasĉambron kaj komencis varbi lernantojn.



*Zhou Li (la dua de dekstre), unu el la redaktoroj de la gazeto "La Mondo"*

La unua kurso konsistis el 30 membroj. Post tri monatoj ni funkciigis plian kurson ankaŭ kun 30 membroj kaj prenis kiel lernolibron la libron "Proleta Esperanto-Kurso" kompilitan de la Japana Proleta Esperantista Unio. S-ro Maier senhezite akceptis mian peton, ke li gvidu la lecionojn de prononcado kaj konversacio. Li montris grandan entuziasmon kaj fervoron en sia instruado kaj neniam postulis rekompencan. Li estas vera esperantisto meritanta mian respekton.

La du kursoj daŭris ĝis 1939. Poste mi informiĝis, ke plejparto de la kursanoj iris al la liberigitaj regionoj por rezisti kontraŭ la japanaj agresantoj. Mi sentas min kontenta, rememorante pri tiu travivaĵo.

Post la fino de la Esperanto-kurso mi ellaboris por mi lerno-planon inkluzive de lernado de Esperanto kaj aliaj fremdaj lingvoj. Miaj kontaktoj kun s-ro

Maier fariĝis pli oftaj. Ni decidis instrui reciproke la respektivan patrinan lingvon. En nia kunestado ni ĉiam parolis Esperante. Dum tiu tempo mi ĉinigi Esperantajn literaturaĵojn.

Post kiam Tianjin estis liberigita en 1948, mi fariĝis pli okupita kaj malofte kontaktis kun li. Poste mi venis labori en Pekino kaj li iris al GDR. Sekve niaj kontaktoj fariĝis des pli maloftaj. Tamen mi neniam forgesos lian helpon al mi kaj por ĉiam memoros la pasintajn belajn tagojn kun li. Lastatempe mi informiĝis, ke li fartas bone kaj restas tre amika al la ĉina popolo. Sanon kaj longan vivon al li.

*\* La aŭtoro estas konsilanto de la Ĉina Esperanto-Ligo.*

*\*\* Pro malfreŝa memoro la aŭtoro ne estas certa en la skribmaniero de la nomo de s-ro Hiraki Rjujiro. Li petas precizan skribmanieron de la nomo.*

# RENKONTE AL LA NOVA JARO

## ABONVARBA KAMPANJO

por

## EL POPOLA ĈINIO

Ekde 1-a nov. 1982 ĝis 28-a feb. 1983

Tiu, kiu abonos aŭ reabonos dum la supra periodo de la kampanjo, ĝuos 20% da rabato kaj donace ricevos Esp. koloran kalendaron por 1983.

### ABONTARIFO

1 jaro (12 n-roj)	£3.00	US\$6.00	post	=£2.40	US\$4.80
2 jaroj (24 n-roj)	£5.00	US\$10.00	rabatado	=£4.00	US\$8.00
3 jaroj (36 n-roj)	£7.00	US\$14.00		=£5.60	US\$11.20

*Atentigo: La supra tarifo ne validas en landoj de Azio. Afriko kaj Latin-Ameriko. Abonantoj kaj reabonantoj tie bonvolu atenti EPC-anoncon en sialandaj Esp.-periodaĵoj aŭ sin turni al la loka peranto.*


### Memoraĵoj por abonvarbantoj

Kore bonvenigata estos ĉiu, kiu volonte varbos abonantojn por EPC. La varbanto sendu abonant-liston kaj abon-pagojn al la loka peranto kun peto, ke la lasta enskribu lin aŭ ŝin kiel abonvarbanton. Aŭ oni sendu la liston kaj pagojn rekte al la suba adreso. Ĉin-stila memoraĵo iros al ĉiu abonvarbanto proporcie al ties akirita sukceso.

*Tamen, ne forgesu aboni aŭ reaboni por vi mem!*

**PROSPEKTON KAJ  
PROV-EKZEMPLERON ONI  
SENDOS SENPAGE LAŬ PETO**

Esperanta Sekcio de  
CENTRO DE  
ĈINAJ ELDONAĴOJ  
(GUOJI SHUDIAN)  
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio






# Petrolkampo kune ekspluatata de Ĉinio kaj Japanio en Bohai-marano

Fotoj de SONG YOUMIN kaj CHEN XUESHENG

Ĉinio kaj Japanio sukcese boris puton kun taga produktokvanto de mil tunoj da nafto sur la kontinenta breto de suda Bohai-marano, 192 km. oriente de la haveno Tanggu, Tianjin. Tio montras belan perspektivon por produkti nafton kaj gason en Bohai-marano.

La puto estas 3 334.5 metrojn profunda. La ĉina putobora ŝipo Bohai n-ro 6 plenumis la boradon, kiu daŭris de la 13-a de decembro 1981 ĝis la 7-a de marto 1982.

Nafto ŝprucas el la puto Bohai n-ro 8.




Nokto de la naftokajo en la nova haveno Tanggu






Laboristoj de Ĉinio kaj Japanio ekzamenas putoboran ekipaĵon.




Surmara sismologia esplorado




Putoboristoj laboras sur putobora platformo.







Čina putoboristo laboras sur ŝaktoskafaldo.





Ĉina helikoptero transportas provizojn al la putobora platformo Bohai n-ro 6.



Laboristoj rigardas filmon sur putobora platformo.

Laborantoj de Ĉinio kaj Japanio kolektas specimonojn de oleo por ekzameni ĝian kvaliton.

## **NOVA ELEKTRA FERVOJO INTENSE KONSTRUATA**

Ĉinio konstruas inter Pekino kaj Qinhuangdao novan dutrakan elektran fervojon. La dutraka parto de la fervojo longos 127 km. kaj la totala longeco de la fervojo estos 280 km. La fervojo ligiĝos okcidente kun la elektra fervojo inter Pekino kaj la karbourbo Datong en Shanxi-provinco kaj oriente atingos la havenurbon Qinhuangdao. Dank' al la nova fervojo oni povos transporti la karbon rekte de Datong al Qinhuangdao.

## **PLEJ GRANDA ĈINA KRANIO- CEREBRA ESPLOR-CENTRO KONSTRUATA**

La Centro estos finkonstruita en oktobro ĉi-jare, en Pekino. Ĝi inkluzivas la Pekinan Neŭrokirurgian Instituton faman pro ĝia bona kuracado de kraniocerebraj malsanoj kaj la hospitalon Tiantan okupiĝantan ĉefe pri kraniocerebra operaciado

La Centro, kun totala plankareo de 60 000 kvadrataj metroj, konsistas el ambulatorio povanta akcepti ĉiutage 3 000 pacientojn, malsanulejo kun 800 litoj, operaciejo kaj domo por laboratorioj, kiuj havas areon de 6 000 kvadrataj metroj.

La Pekinan Neŭrokirurgian Instituton akceptis UNO kiel Centron de Scienca Esplorado, Trejnado kaj Kunlaboro pri Neŭrokirurgio de la Monda San-organizaĵo.

## **NOVA STRUKTURO DE ĈINA AGRIKULTURO**

Ekde decembro 1978 Ĉinio reguligis la proporciojn inter la grenaj kaj ekonomiaj plantoj unuflanke kaj la terkulturo, forstumado,

brutobredado, flankokupoj kaj fiŝkaptado aliflanke, kaj praktikas la principon disvolvi multspecajn entreprenojn kaj kulturaj plantojn laŭ lokaj kondiĉoj. Sekve, la produktokvanto de oledonaj plantoj en 1981 pliiĝis je 4.95 milionoj da tunoj kompare kun tiu de 1978, t.e. je 95.6%; tiu de kotonon pliiĝis je 800 000 tunoj, t.e. je 36.9%; tiu de sukerdonaj plantoj je 51.3%; kaj tiu de tefolioj je 27.8%. La totala produktokvanto de porka, ŝafa kaj bova viandoj kreskis je 47.5%; tiu de lakto je 59.4%; kaj tiu de ovoj je 23.8%. Kvankam la areo por grenaj plantoj reduktiĝis je 5.6 milionoj da hektaroj, tamen la produktokvanto de greno kreskis je 6.6%.

Post la reduktado de la areo por grenaj plantoj, la areo por ekonomiaj plantoj plimultiĝis je 3.06 milionoj da hektaroj kompare kun tiu de 1978. Sur la montdeklivoj, kiuj estas nekonvenaj por grenaj plantoj kaj iam neracie estis utiligitaj kiel agroj, denove kreskas arboj kaj herboj.

## **NOVA PLIĜO DE LA EKSTERA KOMERCO DE ĈINIO**

La totala valoro de la ekstera komerco de Ĉinio senĉese kreskas. En 1981 la totala valoro de la importaj kaj eksportaj varoj atingis 40.4 miliardojn da usonaj dolaroj, kio estas duobliĝo kompare kun tiu de 1978. La valoro de la eksportaj varoj atingis 20.9 miliardojn da usonaj dolaroj (en 1978 ĝi estis 9.7 miliardoj da usonaj dolaroj). En la unua duono de 1982 la totala valoro de la eksportaj varoj kreskis je 10.2% kompare kun tiu de la sama periodo de la pasinta jaro.

En 1981, la totala valoro de la eksportaj pez-industriaĵoj (inkluzive

de nafto kaj rafinita petrolo) kreskis de 25.5% en 1978 al 43.6% kaj unuafoje superis tiun de tekstilaĵoj, agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj. Dank' al la fondo de bazlokoj por eksportaj varoj, la fonto de la eksportaj varoj multe plivastiĝis. La eksportaj kvantoj de 26 specoj de varoj, ekz., porkaj haregoj, pretigitaj maldikaj intestoj de porko, plumoj, kunikla lano, kapraj feloj, ŝafaj haroj, rezino, mielo, verdaj tefolioj, mentolo, cinamo, silko, kotona ŝtofo, eltiraj brodaĵoj, lako, ĉinaj herbodrogoj k. a., okupas ĉiu la unuan lokon en la mondo.

## **LA JARA TRANSPORTA KVANTO DE LA ĈINAJ HAVENOJ ATINGIS PLI OL 200 MILIONOJN DA TUNOJ**

Dank' al la rapida disvolviĝo de havena konstruado en Ĉinio, la jara transporta kvanto de la ĉinaj havenoj nun atingis pli ol 200 milionojn da tunoj (en la komenco de la kvindekaj jaroj ĝi estis nur 10 milionoj da tunoj).

Ekde 1979, ĉe la marbordo kaj grandaj havenoj de la rivero Jangzi oni nove konstruis aŭ rekonstruis 11 kajojn, kiuj ekfunkciis unu post alia. Sekve, la transporta kvanto de la ĉinaj havenoj pliiĝis je 6.36 milionoj da tunoj.

Jam funkcias la specialaj kajoj por konteneroj en la havenoj de Dalian, Ŝanhajo, Qingdao, Huangpu kaj Tianjin.

Krome, oni konstruas ĉe la rivero Jangzi nombron da profundakvaj ankrejoj en la havenoj de Nankino, Zhenjiang, Nantong kaj Zhangjiagang de Jiangsu-provinco kaj la haveno de Zhicheng de Hubei-provinco.



## RAPORTO PRI LA 67-A UK EN PEKINO

Posttagmeze de la 23-a de aŭgusto, la Ĉina Esperanto-Ligo okazigis en Pekino kunvenon, en kiu Zhang Qicheng, estro de la Ĉina Esperanto-Delegacio, faris raporton pri la 67-a UK al pli ol 120 novaj kaj veteranaj esperantistoj. En sia pli-ol-unu-hora raporto Zhang detale prezentis la kongreson kaj aktivadojn de la ĉina delegacio. La ĉeestantoj ĝojis pro la atingoj de la kongreso.

## UNUAFOJA ESPERANTA EKZAMENO EN SHENYANG

Por ekzameni atingojn de la Esp-kursoj en la lastaj du jaroj kaj kuraĝigi la kursanojn pli bone lerni nian lingvon, la prepara grupo de la Liaoning-a Esperanto-Asocio faris la unuafojan ekzamenon je la 14-a de aŭgusto en la urbo Shenyang. Ĝin partoprenis pli ol cent kursanoj de diversaj profesioj, kaj duono de ili gajnis ĝojindan sukceson.

## ESP-INSTRUISTOJ TREJNITAJ EN JIANGSU

Por trejni Esperantajn instruistojn por la tuta provinco, la prepara grupo de la Jiangsu-a Esperanto-Asocio funkciigis Porinstruistan Esperanto-kurson en la Poŝta kaj Telekomunika Instituto de Nankino, de la 26-a de julio ĝis la 15-a de aŭgusto. Tie lernis pli ol 40 kur-

*Respondeculoj de la Hunan-a Esperanto-Asocio Xie Zujun (la dua de maldekstre) kaj Yang Kaiyuan (la kvara de maldekstre) kun s-ro Leitner Gerhard Wolfgang*



sanoj el dek lokoj de la provinco. La kurson gvidis profesoro Zhu Yigui de la Nankina Universitato kaj fama esperantisto Zensto.

## AMIKAJ INTERVIDIĜOJ INTER ĈINAJ KAJ ALILANDAJ ESPERANTISTOJ

La 20-an de aŭgusto, respondeculoj de la Hunan-a Esperanto-Asocio Xie Zujun kaj Yang Kaiyuan intervidiĝis kun profesoro Leitner Gerhard Wolfgang, lingvisto de FR Germanio, kiu estis vizitanta la urbon Changsha. La ĉinaj kaj germana samideanoj interŝanĝis opiniojn pri la Esp-movado en sia lando kaj montris deziron plifortigi rilatojn inter si.

La 16-an de aŭgusto, nederlanda esperantistino Ineke Emmel Kamp vizitis Kantonon, kie ŝi havis ĝojan renkontiĝon kun la instruistoj kaj lernantoj de la postlabora Esperanta lernejo de Kantono. La gasto donacis librojn al la tieaj samideanoj.

La 29-an de la sama monato instruistoj de la postlabora Esperanta lernejo de Kantono intervidi-

ĝis kun la fama japana esperantisto Kawasaki Naokazu, membro de la Instruista Vizitgrupo de Nara Universitato, kaj lia edzino Ozaŭa Juki, fratino de la fama internacisma batalanto Verda Majo, kaj havis kun ili amikan interparolon.

## ESPERANTISTA KUNLOĜADO EN WUHAN

Por levi Esperantan konversacian nivelon de ŝiaj membroj, la Wuhan-a Esperanto-Asocio okazigis, en la pitoreska Wuhan-a Universitato, kunloĝadon de la 8-a ĝis la 12-a de aŭgusto. 83 novaj kaj malnovaj esperantistoj tie pasigis agrablajn tagojn.

## INFORMO EL NEPALO

La Jogambara Instituto de Esperanto de Nepalo kunvenis okaze de la datreveno de la morto de Zamenhof kaj diskutis pri la graveco de Esperanto kaj pri la Esperanto-movado en Ĉinio, Japanio kaj aliaj landoj.

## LA 24-A KONGRESO DE KEA

En Fredrikton (provinco Nova Brunsviko) okazis de la 3-a ĝis la 5-a de julio la 24-a Kongreso de Kanada Esperanto-Asocio. Estis unuafoje, ke la kongreso estis organizita en la urbo kaj la provinco kie ĝis nun ne estis esperantistoj. La okazon de la kongreso oni utiligis por komenci korespondan kurson, tri semajnojn antaŭe. Ankaŭ en gazetoj aperis artikoloj pri Esperanto kaj informoj pri la kongreso. Montriĝis granda intereso pri la internacia lingvo. Jurnalistoj ĉeestis



*La Jogambara Instituto de Esperanto de Nepalo kunvenas okaze de la datreveno de la morto de Zamenhof.*



tutajn kultur-distrajn programojn de la kongreso kaj filmis la plejparton.

KEA-kongreso finiĝis kun sukceso, ĉar la provinca televido decidis elsendi E-kursojn faratajn de la viktoria E-grupo.

### AKTIVADO DE ASTURA ESPERANTO-ASOCIO DE HISPANIO DUM FUTBALA MONDA KONKURSO

En la montro-foiro "PANORAMO ASTURIO-82" organizita paralele al la eventoj de la Futbala Monda Konkursko, de la 12-a ĝis la 27-a de junio, la nomita asocio disponigis al si standon kaj tie aktivis tutajn dek ses tagojn. La deĵorantoj senlace informis pri Esperanto, klarigis ĉies demandojn kaj samtempe proponis siajn servojn senpage kiel interpretistoj al eblaj esperantistoj, kiuj vizitis "PANORAMA ASTURIO-82". Ili sukcesis interesi multajn vizitintojn pri eklerno de Esperanto kaj eĉ improvizadis duonhoran kurseton en la stando.

### CENTRO DE MUZIKAJ KAJ PAROLAJ VAROJ

Ges-anoj R. Corsetti kaj A. Brennan de Italio starigis centron, kiu okupiĝas nur pri disvastigo de muzikaj kaj parolaj varoj en Esperanto. Ili volonte aŭdos de eldonistoj, kiuj jam produktis tiajn materialojn kaj deziras trovi por ili pli larĝan merkaton.

Ĉe tiu centro jam troviĝas disponeblaj kasetoj, nome "Danĝera ul'", "La vojo", "Kontakto", "Venus liber'", "Per nia nura vol'", "La poezio de la patrolo", ktp, kiuj estas mendeblaj ĉe R. Corsetti kaj A. Brennan, Via delle Cave 82C, I-00191 Roma, Italio.

### SPORTO KAJ ESPERANTO

Internacia Sporta Seminario okazis en Madrido de la 8-a ĝis la 11-a de julio. En publika dokumento, transdonita al la nacia kaj internacia gazetaro, la Seminario atentigis la mondajn sportajn

*La Esperanta stando dum la montro-foiro "Panorama Asturio-82"*



instancojn pri la lingvaj obstakloj, kiuj malhelpas la senperan komunikadon inter la sportistoj, kaj kiuj bremsas la laboron de la Internacia Olimpika Komitato, kaj aliaj sportaj organizaĵoj.


Kiel solvon de tiu problemo la Seminario petis, ke la kompetentaj instancoj kuraĝigu la lernadon de Esperanto fare de sportistoj, arbitroj, sport-juĝantoj kaj sport-jurnalistoj.

### EŬROPA KOMUNUMO KAJ ESPERANTO

En la 60-a Germana Esperanto-Kongreso d-ro W. Bormann, fama esperantisto de FR Germanio, prezentis al la kongreso detalan

rezolucion, kiu trovis viglan aplaŭdon kaj akcepton: en ĝi la Federacia Registaro estas instigata kontribui al racia solvo de la lingva problemo en Eŭropa Komunumo. Tio signifas, ke EK rezignu ĉe multaj dokumentoj kaj laborpaperoj pri traduko en ĉiujn oficialajn lingvojn, enkondukante Esperanton kiel eblan nuran laborlingvon por tiuj certaj celoj. La decido, eldoni la Eŭropan Pasporton nur en la angla kaj la franca krom en la nacia lingvo, trovis fortan malaprobon, ĉar tio povas esti la unua paŝo reen al la lingva hegemonio de kelkaj potencaj popoloj. Racia kaj neŭtrala solvo povas esti nur la uzo de Esperanto apud la nacia lingvo de la eldonanta ŝtato.

*Dum la 24-a Kongreso de KEA s-ro Wally du Temple aŭkcias ĉe la bankedo ĉinajn poŝtmarkojn, senditajn de geamikoj el Ĉinio, por kolekti monon por la kancera kliniko sub la iniciato de juna Terru Fox.*



CONG WENZI:

# La petrolkampo Bohai en Ekspluatado



*Konstruanto de la Nova Haveno de Tanggu*

**E**N la pasintaj du jaroj Ĉinio faris multajn preparojn por ekspluati la petrolkampon en la maro Bohai kaj subskribis kontraktojn kun aliaj landoj pri kunlaboro en ekspluatado. Tiu petrolkampo estas la unua tiuspeca petrolkampo en Ĉinio. Nun ĝi eniris en la etapon de serĉado kaj ekspluatado. Sur la vasta marsurfaco videblas nombro da borturoj kaj naftokolektaj platformoj. Tio prezentas prosperan perspektivon por la nova petrolkampo.


Ĉinio havas vastan marteritorion kaj abundas je naftofontoj. En la mezo de la kvindekaj jaroj la geologia kaj petrola departe-

mentoj de Ĉinio faris multe da laboroj por serĉado kaj ekspluatado de riĉfontoj de nafto kaj naturgaso en areo de miliono da kvadrataj kilometroj en proksimaj maroj. Oni trovis ses petrolkaj gasbasenojn sub la maro Bohai, la suda Flava Maro, la Orienta Ĉina Maro, la buŝo de la Perla Rivero ĉe la Suda Ĉina Maro, la golfo Beibu Wan (Bakbo) kaj la maro Yingge.

En 1967 la marpetrola serĉtrupo de Ĉinio sukcese boris la unuan naftoputon en Bohai-golfo. Dum la pli ol 10 jaroj antaŭ la kuna ekspluatado kun eksterlandaj kompanioj, Ĉinio faris en tiu marsektoro tertreman mezurlinion de 140 000 kilometroj, boris 114 putojn kun totala longeco de 310 000 metroj, trovis kvar petrolkampojn kaj esplore kontrolis la naftoentenan areon de 24.7 kvadrataj kilometroj. Krome, nia lando konstruis pli ol dek putoborajn platformojn, instalas du putoborajn ŝipojn kaj importis kvin tiajn avangardajn ŝipojn. Samtempe, la ŝtato provizis la trupon per grandaj kaj mezgrandaj memproduktitaj aŭ importitaj trenŝipoj kaj aliaj akcesoraj instalaĵoj. La trenŝipoj povas ne nur treni putoborajn ŝipojn, sed ankaŭ transporti la bezonatajn materialojn kaj ankri tiujn ŝipojn.

Dum ekspluatado de la petrolkampo pli ol 10 000 laboristoj estis harditaj, multaj teknikistoj

*La Nova Haveno de Tanggu en konstruado*





plie ekposedis sciencajn sciojn pri marpetrola serĉado kaj ekspluatado. Tiel formiĝis sendependa sistemo por marpetrola ekspluatado. Ĉio tio metis bonan bazon por la internacia kunlaboro en ekspluatado de petrolkampoj.

### **LA PETROLKAMPO CHENGBEI KUNE EKSPLUATATA DE ĈINIO KAJ JAPANIO**

En 1979, por rapidigi la ekspluatadon de la naftofontoj de la kontinenta breto, Ĉinio iniciatis kunlaboron kun aliaj landoj por ekspluati marpetrolon. Chengbei estas grava petrolkampo ekspluatata en la kunlaboro inter Ĉinio kaj Japanio. Ĝi estas la unua mara petrolkampo oficiale malfermita laŭ la internacia normo.

Tiu petrolkampo kun areo de 12 kvadrataj kilometroj situas en la sudokcidenta parto de la golfo Bohai, 84 kilometrojn for de la haveno Tangu. En la fino de aprilo ĉi-jare la unua naftoprodukta puto de la platformo B eklaboris. Du kilometrojn for de ĝi estos starigita la platformo A, kiu skale kaj strukture similas al kaj ligiĝos kun B per dukilometra submara naftodukto por transporti la nafton al kajo. Ĉe tiu kajo povas ankriĝi 15 000-tonela naftoŝipo, kiu veturigas la nafton rekte al eksterlando. Laŭ takso, la du platformoj povos doni pli ol kvar milionojn da tunoj da nafto dum 15 jaroj.

En la esplorita areo de 25 500 kvadrataj kilometroj okcidente kaj sude de la maro Bohai, Ĉinio kaj Japanio kune provboris kvin putojn en la lastaj du jaroj. Nun la kvar boritaj putoj ĉiuj jam donas porindustriajn naftofluojn.

En marto 1981 oni finis boradon de la unua puto en la meza sektoro sude de la maro Bohai. Ĉiutage ĝi produktas 1 000 tunojn da nafto kaj 200 000 kubmetrojn da gaso. La naftan kvaliton oni taksas bona: "la oleo estas pura, senakva kaj malpeza". Geologiaj donitaĵoj montras, ke la naftoriĉa tavolo okupas areon de 26 kvadrataj kilometroj.


En aprilo ĉi-jare la kvara kaj kvina putoj estis boritaj, kaj oni jam finis la provproduktadon de la kvara, kiu povas ĉiutage doni 390 tunojn da nafto kaj 70 800 kubmetrojn da gaso. La kvina nun estas en provproduktado. Se ĝi donos sufiĉan kvanton da nafto kaj gaso, tio signifos, ke sin trovas nova petrol-regiono.

### **NAFTOSERĈADO KUNE FARITA DE ĈINIO KAJ FRANCIO**

La kunlabora regiono de Ĉinio kaj Francio por serĉi kaj ekspluati la mezan parton de la maro Bohai okupas 9 450 kvadratajn kilometrojn. La taskon de serĉado plenumas la Franca Petrola Kompanio ELF, kaj la ĉina putobora ŝipo Bohai n-ro 10 garantie plenumis boradon de du putoj en tiu ĉi regiono.

En la regiono oni jam faris tertreman mezurlinion de 10 000 kilometroj. Kvankam la du boritaj putoj ne elsprucigis nafton, tamen oni jam akiris grandan kvanton da kompletaj donitaĵoj.

Nun jam finiĝis la refoja analizado de la geologiaj donitaĵoj pri la plejparto de la strukturoj en tiu ĉi regiono. La analizado diras, ke tie troviĝas 30 strukturoj, el kiuj dek estas favoraj. Oni esperas trovi du aŭ tri petrolkampojn post kelkjara esploro.



*Kajo por mara petrolserĉado en konstruado*

rado. Nun ambaŭ flankoj estas difinantaj la situon de la tria puto. Antaŭ la jarfino oni trenos la putoboran ŝipon Bohai n-ro 4, kiu nun plenumas sian taskon en la Orienta Ĉina Maro, al tiu loko por fari la boradon de la tria puto. Sukceso aŭ malsukceso en la borado donos ŝlosilan influon al la kono de la kunlabora regiono.

### **RAPIDIGI KONSTRUADON DE LA PETROLBAZO TANGGU**

Tangu, apud la urbo Tianjin, estas la unua marpetrola bazo de Ĉinio. Ĝi taskas al si provizadon al la serĉado kaj ekspluatado de la petrolkampo Bohai, respondecon pri putoborado kaj geologia esplorado en la maro Bohai kaj la suda Flava Maro, fabrikadon de nombro da platformoj kaj riparadon de ŝipoj kaj ekipaĵoj, rezervadon kaj transportadon de nafto produktita de la petrolkampo Bohai, kaj projektadon kaj esploron pri ser-



ĉado kaj ekspluatado de marpetrolo. La konstruado de la bazo influos rekte la rapidecon de ekspluatado de la petrolkampo.

La bazo kovras tri milionojn da kvadrataj metroj. Ĝi havas domojn kun areo de pli ol 400 000 kvadrataj metroj, ses putoborajn ŝipojn, unu putoboran platformon, 13 grandajn bormaŝinojn, 64 diversspecajn helpajn ŝipojn kaj pli ol 2 000 aliajn ekipaĵojn.

Por glate disvolvi la kunlaboron kun aliaj landoj la bazo rapide konstruas kunlaborajn instalaĵojn. En 1982 ĝi komencis konstrui domon kun pli ol 100 laborĉambroj disponigotaj al la du kunlaboraj komitatoj.

De post la kunlaboro plimultiĝas la nombro de japanoj kaj francoj venintaj al Ĉinio. La hotelo kun plankareo de ses mil kvadrataj metroj estas jam plene loĝata.

Tial oni planas konstrui alian samgrandan hotelon.

Krome, laŭ la postulo de eksterlandaj komercistoj, oni konstruas tenejon de 14 000 kvadrataj metroj, kajon je 252 metroj longan kaj staplon de 60 000 kvadrataj metroj. Post la fino de tiuj konstruoj ĉe la maro Bohai aperos grandioza kaj moderna petrolo bazo.



# BUDHISMA PUTUO

**E**N la fama ĉina mita romano "Pilgrimado al la Okcidento" la ĉefa heroo Sun Wukong akompanis sian majstron Tangseng pilgrimi al la Okcidento. Survoje ili ofte renkontis demonojn kaj neniel povis venki ilin, tiam Sun venis al la monto Putuo por peti helpon de Avalokitesvaro. Tio montras, ke jam antaŭ longe Putuo fariĝis budhisma sanktejo. Ĝi, kiel budhisma monto de Ĉinio, estas same fama, kiel la montoj Wutai en Shanxi-provinco, Emei en Sichuan-provinco kaj Jiuhua en Anhui-provinco. Tiu sanktejo ĝuas grandan renomon inter budhanoj kaj elmigrantaj ĉinoj en sudorienta Azio kaj samlandanoj en Hongkongo kaj Aomen.

La monto Putuo situas en la Orienta Ĉina Maro, ĉirkaŭ 100 mejlojn oriente de la golfo Hangzhou, Zhejiang-provinco. Veturinte 40 minutojn de la fiŝhaveno Shenjiamen sur la insularo Zhoushan, oni atingas la monton.

La insuleto, sur kiu staras la monto Putuo, apartenas al la insularo Zhoushan. Ĝi havas areon de ĉirkaŭ 12.5 kvadrataj kilometroj kaj estas en formo de longa sako. La insuleto estas borderita en oriento de strando kaj en ĝia okcidento gardas krutaj montrokoj. Vidate de malproksime, la peze ombrataj montpintoj de la insulo staras unu post alia. Laŭdire, en la jaro 916 p.K. (aŭ en 858)

*La baseno de la templo Puji, kie budhanoj liberigas aĉetitajn vivajn fiŝojn*




# MONTO

de XUESHENG

japana bonzo Keicuba petis de Wutai-monto bronzan statuon de Avalokitesvaro kaj estis revenanta hejmlanden. En la maro li estis kaptita de ventego proksime de Putuo. Li ekdubis, ĉu la Budho volas iri al la orienta Japanio, kaj cetere la pitoreska monto Putuo estas tiel bela, kiel paradizo, kaj la bonzo konstruis templon kune kun la insulanoj por kulti ĉe la statuo de Avalokitesvaro. Pro tio oni nomis ĝin "Templo de Avalokitesvaro Ne Volanta Foriri". En la postaj dinastioj oni konstruadis templojn sur la insuleto, kaj tiel en la plej prospera tempo por la insulo tie troviĝis pli ol 200 temploj kaj monaĥinejoj kun 3 000 cenobitoj. Tiam ĝi meritis la nomon "Budhana Lando en Maro". Nun ankoraŭ restas pli ol 70 grandaj kaj malgrandaj temploj kaj monaĥinejoj, inter kiuj la plej famaj estas la temploj Puji, Fayu kaj Huiji.

Ekde la bordo oni piediras mallongan distancon por veni al la ŝtonplata vojeto, kiu kondukas al la templo Puji. Ambaŭflanke de la larĝa pura granita vojo ombras altaj multjaraj arboj. Pro malmulteco de vizitantoj en ordinaraĵ tagoj, la loko dronas en kvieteco. Sed en la tagoj de naskiĝo, monaĥiniĝo kaj budhiĝo de Avalokitesvaro venas tien ĉinaj kaj transmaraj pilgrimantoj, kun rozario ĉirkaŭ la kolo kaj incensaĵsako ĉe la kokso.

Irinte ĉirkaŭ 1.5 kilometrojn laŭ la vojo, oni atingas la templon Puji, kiu sidas sub la monto Ling-



*La ĉefa halo en la templo Puji*

jiu, unu el la 18 ĉefaj montpintoj sur la insuleto. Puji estas la ĉefa templo sur la monto. Ĝi estis ekkonstruita en 1080 kaj la nunaj sep haloj estis rekonstruitaj en la regperiodo de la Qing-dinastia imperiestro Yongzheng (1723 — 1735). La tuta templo okupis 37 000 kvadratajn metrojn, el kiuj 11 400 kvadrataj metroj estas kovritaj de la konstruaĵoj. Antaŭ la templo troviĝas la klara baseno, kie budhanoj liberigas aĉetitajn animalojn, antikvaj kamforarboj apenaŭ brakumeblaj por 4-5 homoj kune, ponto konstruita en Ming-dinastio (1368 — 1644), pagodo farita en Yuan-dinastio (1279 — 1368), kaj monumento kun gravurita skribo de imperiestro Yongzheng. Ĉiuj donas al la vizitantoj impreson de antikveco kaj majesteco. Dekstre en la korto estas sonorilturo kaj maldekstre tamburturo. La ĉefa halo impone staras sur la ŝtona bazo pli ol du metrojn alta. En la mezo de la halo sidas la statuo de Avalokitesvaro. Tie fumas incensaĵoj kaj lumas kandeloj.

Kvar kilometrojn nordoriente de Puji estas la templo Fayu kun haloj starantaj unu super alia laŭ la montodeklivo. Enirinte tra la portalo, oni supreniras en plurajn halojn kvazaŭ en ĉielan palacon. Tie estas la vidinda halo Dayuantong, kiu estis translokita el la Imperiestra Palaco de Ming-dinastio en Nankino. En la centro de la plafono estas enfalinta cirklo, kiun ĉirkaŭas naŭ vivecaj drakoj tordiĝantaj. Vere admirinda artaĵo! En la templo kreskas cipreso nomata "Drako kaj Fenikso", laŭdire 400-jara, kiu disbranĉiĝas je la alteco duonmetre super la tero. Unu el la branĉoj similas al drako kaj la alia al fenikso.

Forlasinte la templon Fayu, oni devas trairi densan arbaron okcidente de la templo kaj montvojeton kun mil ŝtupoj por atingi la plej altan monton sur la insuleto, altan pli ol 290 metrojn. La templo Huiji estas dense ombrita de la arbaro sur la montsupro. Ĝi estis konstruita en Ming-dinastio kaj plivastigita en Qing-dinastio. La





*La Tajdabrua Kaverno*

tegmento de la granda halo estas kovrita per tegoloj lazuraj, helverdaj, flavaj kaj purpurruĝaj, rebrilantaj en la sunlumo.

La monto Putuo famas ne nur pro la budhismaj temploj sed ankaŭ pro la naturaj pejzaĝoj. Starante sur la montpinto, oni havas belan vidon: Blankaj nuboj ŝvebas en la blua firmamento kunfandiĝanta kun la maro, kaj la maro estas punktita de insuloj kaj velŝipoj. Kaj la monto mem, kvazaŭ flosanta boato. Kiel rava pejzaĝo!

La monto havas multajn interesajn rokojn kaj kavernojn. La kolosa roko Pantuo en la formo de koro, larĝa ĉe la supro kaj mallarĝa ĉe la piedo, aspektas falonta de la

monto, tamen staras tie tre solide. La duobla roko "Du Prediko-aŭskultantaj Testudoj" estas en formo de du testudoj, el kiuj unu levas la kapon kaj la alia kuŝas. Laŭdire, du testudoj surbordiĝintaj por aŭskulti predikon ne sukcesis reveni en la maron kaj ŝtoniĝis. La rokego Bodhidharma similas al kaduka bonzo kun sako sur la dorso. La "Suna Kaverno" sin direktas al la oriento. Se oni rigardas ĉe la aperturo la sunon leviĝantan el la maro, ĝi aspektas kvazaŭ giganta rado. La "Tajdabrua Kaverno" estas tuj ĉe la maro, kun alto de kelkaj metroj kaj profundo nesondebla. En la kaverno muĝas la tajdakvo kun tondra bruego.

La temperaturo de la plej varma somera monato sur Putuo estas

nur 27°C, tial la loko estas bona somerumejo. La kvieta golfo kaj delikata strando servas al turistoj kiel idealaj banejoj. La parto de la strando kun la nomo Baibusha estas frekventata banejo. Nun la monto Putuo jam fariĝis loko vizitata de multaj homoj eĉ en nepilgrimaj tagoj.








Baibusha ĉe la marbordo

**Pejzaĝoj de la monto Putuo**






La Suda Ĉielpordego

La kolosa roko Pantuo







La templo Fayu


**La monto Putuo en Zhejiang-provinco estas unu el la budhismaj sanktejoj de Ĉinio. Pri tiu pitoreskejo de-tale raportas la artikolo "Budhisma Monto Putuo" en tiu ĉi numero.**

Fotoj de HE SHIYAO

Antikvaj arbaroj en Putuo




## FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ



Sunleviĝo ĉe Ayers Rock, en centra Aŭstralio. Sur glata ebenajo staras roko 330 metrojn alta, 4 kilometrojn longa kaj 2 kilometrojn larĝa.

Foto de **HARRY TORR**  
(Aŭstralio)

## Vaporumita anaso kun fungoj





**ATEN-**

**TU!**



**EPCĤ**

## Flugos al la tuta Ameriko

Dum longa tempo ni sendis nian gazeton per ŝipo al niaj legantoj en Norda Ameriko kaj Latin-Ameriko, kaj ili ricevis ĝin post minimume du monatoj pro la longa veturado. Por ke nia gazeto ĝustatempe atingu iliajn manojn, ni decidis ĝin sendi aerpoŝte ekde la 11-a numero de 1982 sen pliigo de la abonkosto, pri kio ni interkonsiliĝis kun la Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (Guoji Shudian) kaj ricevis ties aprobon. Tiun specialan aranĝon ni faros konsiderante aparte la amerikajn abonantojn, kiuj certe ĝojos pro tio.

## PLIIĜOS KOLORAJ BILDPAĜOJ

Laŭ la peto de niaj legantoj pliriĉigi la bildpaĝojn, ni decidis plimultigi la kolorajn bildojn je kvar paĝoj ekde la unua numero

de 1983. Tiam la legantoj vidos pli da koloraj bildoj pri ĉinaj pejzaĝoj, la vivo de la ĉina popolo kaj la kulturo kaj arto de Ĉinio.

LA RED.

## VAPORUMITA ANAŜO KUN FUNĜOJ

Materialoj:

Anaso unu  
Oleo 500 g. (15 g. estos konsumitaj)  
Lamenfungoj (trempu en akvo, se sekigitaj) 100 g.  
Rizvino 25 g.  
Sojo 35 g.

Salo 5 g.  
Haketitaj cepo kaj zingibro 5 g.  
Trapa aŭ alispeca amelo 15 g.  
Blanka sukero 2.5 g.

Preparado:

1. Tranĉe malfermu la dorson de la anaso. Ŝmiru ĝian haŭton per la vino kaj sojo. Fritu ĝin en

bolanta oleo, ĝis ĝi fariĝas flava.

2. Metu la frititan anason en vaporumilon. Vaporumu ĝin kun la fungoj kaj spicaĵoj unu horon. Metu ĝin sur pladon.

3. Verŝu la sukron en paton kaj boligu ĝin, ĝis ĝi fariĝas densa. Miksu la amelon kun la suko kaj verŝu ilin sur la anason.



*Antaŭ fridigado de dolĉakvaj fiŝoj en la Akvoproduktaĵa Prilaborejo de Zhuanghe-gubernio, Liaoning-provinco*

CHEN XIAOJUN:

## *BREDADO DE DOLĈAKVAJ FIŜOJ EN ĈINIO*

ĈINIO havas multajn riverojn kaj lagojn, kies totala areo superas 16.7 milionojn da hektaroj. Inter ili kvin milionoj da hektaroj povas esti utiligataj por bredi fiŝojn. En Ĉinio abundas specioj de dolĉakvaj fiŝoj, kies totala nombro estas ĉirkaŭ kvincent. Estas fame konataj la kvar bonspecioj de fiŝoj — nigra karpko, herba karpko, blanka karpko kaj aristiktuzo. Ankaŭ la blanka

angilo, la famaj arĝenta fiŝo kaj blanka salikoko en la lago Taihu, la manĉura fiŝo kun blanka viando kaj malmultaj ostoj, la nigraŝtria karpko de Xinjiang, huang-fiŝo (*Gymnocypris*) de Qinghai, la grandkapa fiŝo de Yunnan, la salmo kaj acipensero de la ĉina nordoriento, la karpko, karaso, bramo, ling-fiŝo (*Cirr-hina*), nigra fiŝo (*Ophicephalus*)

kaj suo-fiŝo (*Liza*) estas apetitivekaj bongustaj.

Ĉinio havas tiel multajn dolĉakvajn fiŝospeciojn, ke la regiono sude de la rivero Jangzi estas de longe nomata “Lando de Fiŝoj kaj Rizo”, kaj ĉe la riveroj Songhua kaj Nenjiang en ĉina nordoriento cirkulis la diro: “Oni povas ĉasi kapreolojn per bastono kaj kapti fiŝojn per



ĉerpilo.” Malgraŭ tio tuj antaŭ la fondiĝo de la popola respubliko en 1949 la jara produktokvanto de dolĉakvaj fiŝoj de Ĉinio estis nur 150 000 tunoj.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio la popola registaro multe atentis la bredadon de dolĉakvaj fiŝoj kaj rigardis tion kiel gravan entreprenon en la disvolvo de la agrikultura ekonomio. Krom plene disvolvi la pli ol okcent dolĉakvajn fiŝ-bredejojn, la ŝtato konstruis fiŝbredajn basenojn kun la totala areo de 36 500 hektaroj por liveri al la merkato pli da fiŝoj. Por levi la entuziasmon de kamparanoj por fiŝbredado, la Ŝtata Buroo de Prezoj en 1979 pliigis la aĉetan prezon de akvoproduktaĵoj je 30%. Nun la bredado de dolĉakvaj fiŝoj estas entreprenata ĉefe de la popolaj komunumoj, produktaj brigadoj kaj taĉmentoj, kaj ankaŭ kamparanoj povas utiligi malgrandajn akvejojn por bredi fiŝojn. Dank’ al ĉi tiuj rimedoj, la bredado de dolĉakvaj fiŝoj en Ĉinio multe disvolviĝis en la pasintaj jaroj kaj la produktokvanto leviĝis pli kaj pli. En 1981 la produktokvanto de dolĉakvaj fiŝoj de Ĉinio atingis 1.37 milionojn da tunoj kaj okupas la unuan lokon en la mondo.

### NOVAJ TEKNIKOJ POR BREDI FIŜOJN

Jam antaŭ 500 a. K. en Ĉinio troveblis notoj pri dolĉakva fiŝbredado. La plej frua ĉina verko pri fiŝbredado laŭdire estis verkita de ekziginta altrangulo Fan Li en 437 a. K. Tiam li bredis karpojn ĉe la lago Taihu en la nuna provinco Jiangsu. En la libro li resumis sian sperton pri artefara eloviĝo de karpoj kaj ilia lageta bredado. Poste en Tang-dinastio (618-907 p. K.) Ĉinio komencis



*Kulturado de perlokonkoj en bredejo de fiŝoj*

bredi la nigran karpon, herban karpon, blankan karpon, aristiktuzon kaj aliajn. En Ming-dinastio (1368-1644 p. K.) Ĉinio jam posedis kompare perfektajn metodojn por bredi la kvar fiŝospeciojn, kaj tiam oni jam donis atenton al kulturado de fiŝaj nutraĵoj, preventado kaj kuracado de fiŝaj malsanoj kaj miksa bredado de malsamspeciaj fiŝoj.

Nun la specioj de fiŝoj bredataj en Ĉinio multe pliigis kaj oni jam trovis perfektajn sciencajn metodojn por la bredado. Oni, ekzemple, bredas malsamspe-

ciajn fiŝojn en malsamaj akvotavoloj en lageto kaj bredas fiŝojn en rizkampoj. La popola komunumo Helie, en antaŭurbo de Wuxi de la provinco Jiangsu, bredas sep speciojn de fiŝoj en unu lageto, inkluzive nigran karpon, herban karpon, blankan karpon, karpon, aristiktuzon kaj bramon. En la supra tavolo vivas blankaj karpoj kaj aristiktuzoj, kiuj prenas planktonon kiel sian nutraĵon. En la meza tavolo vivas herbaj karpoj, kiuj prenas herbon kiel sian nutraĵon. En la malsupra tavolo vivas ni-

### *Por selekti bonan specion*



graj karpoj, kiuj manĝas limneojn, mitulojn kaj aliajn moluskojn. La ekskremento de nigraj kaj herbaj karpoj faras la akvon fekunda, kio utilas al kreskado de planktono, nutraĵo de la blanka karmo kaj aristiktuzo. Kiam blankaj karpoj kaj aristiktuzoj formanĝis planktonojn, la akvo fariĝas klara kaj utila por la kreskado de herbaj karpoj. Ankaŭ tio, ke karpoj, bramoj kaj karasoj formanĝas la restantajn nutraĵojn, estas utila al plibonigo de la akva kvalito. La akvo de la komunumo povas produkti meze po 500 ĝis 1 000 kilogramojn da fiŝoj en unu hektaro. La fiŝnutraĵoj uzataj de la komunumo estas kompare malmultekostaj, tial la produktokosto estas malalta.

La kamparanoj kulturadas ekzemple lemnon en malgrandaj akvejoj kaj sur ties bordoj legomojn, sojfabon, kukurbon, bataton kaj aliajn, aŭ kolektas lim-

neojn kaj aliajn moluskojn por malmultekoste nutri la fiŝojn.

La kamparanoj de la gubernio Shunde en la provinco Guangdong jam de centoj da jaroj kulturadas morusarbojn kaj bredas silkraŭpojn kaj fiŝojn samtempe. Ili elfosas ŝlimon kaj koton el fiŝlaĝetoj kaj amasigas ilin sur la bordojn de la fiŝlaĝetoj por tie kulturi morusarbojn. La fekunda koto kreskigas la morusarbojn prospere. Kaj la ekskremento kaj la krizalidoj de silkraŭpoj estas plej bona nutraĵo por la fiŝoj.

Kamparanoj de la provincoj Sichuan kaj Hunan kutime bredas fiŝojn en rizkampoj. Fiŝoj povas formanĝi herbaĉojn en rizkampoj kaj ilia ekskremento estas sterko por rizplantoj. Krome, fiŝoj ŝatas manĝi insektojn malutilajn en rizkampoj kaj povas malkompaktigi la grundon, kio utilas al malkomponado de la sterko. Tiuj rizkampoj, en kiuj

oni bredas fiŝojn, ĝenerale povas pli produkti je 10%. La supreme menciitaj metodoj estas laŭdataj de fakuloj de UNO, Usono, Japanio kaj multaj aliaj landoj. Oni laŭdis la metodojn "modelo de plena utiligo de la lokaj riĉfontoj kaj tenado de la ekologia ekvilibro".

Ankaŭ la scienc-esploraj institutoj pri akvoproduktaĵoj kaj la ŝtataj fiŝejoj ofte faras esplorojn por preventi fiŝajn malsanojn, plibonigi fiŝspeciojn kaj nutraĵojn, kaj samtempe ili disvastigis la sukcesajn metodojn tra la tuta lando.

### ARTA GENERADO


La dolĉakvaj fiŝoj kutime elmetas sian fraĵon en rivero, ne en cisterno. Tial oni devas elakvigi fraĵon en rivero. Iuj fakuloj de aliaj landoj esploris artefaran fraĵo-elmetadon de dolĉakvaj fiŝoj, sed malsukcesis. El tio iuj konkludis, ke estas neeble por dolĉakvaj fiŝoj elmeti fraĵojn en cisterno.

En 1953 nenormala ekologia fenomeno aperis en iuj riveroj en la provinco Guangdong: al la provinco mankis fiŝidaro. Oni devigite alportis fiŝidaron el malproksimaj lokoj. Tio altigis la produktan koston de la plenkreskaj fiŝoj kaj bridis ĝian disvolviĝon.

Tiam, Zhong Lin, esploristo de la akvoproduktaĵa instituto Nanhai de Guangdong, komencis esplori artefaran generadon de blanka karmo kaj aristiktuzo en cisterno.

Por akiri elementajn faktojn pri fraĵo-elmetado de diversspeciaj patrinaj fiŝoj en riveroj kaj pri koncernaj akvaj niveloj, flurapideco, oksigen-entena kvanto, temperaturo, koloro, kvalito de la fundo kaj ilia generado,

*La laborantoj de la Akvovivaja Instituto de Hubei-provinco eksperimentas pri kresko de karpoj.*





Zhong Lin kaj liaj asistantoj esploris iujn ĉefajn riverojn en Guangdong kaj Guangxi. En junio 1958 li fine kreis metodojn, kiu kombinis la eksteran medion kun stimulado de frajo-elmetado. Ĝi unuafoje sukcese generigis blankajn karpojn kaj aristiktuzojn en cisterno. En 1960 Zhong Lin solvis la generigan problemon pri la herba karmo. La sukcesa solvo de la artefara generado de dolĉakvaj fiŝoj malfermis vojon por grandaree bredi fiŝojn. Samtempe kun tio ĉinaj akvoproduktaj sciencistoj sukcese generigis hibridon: novspecian dolĉakvan fiŝon, kiu kreskas rapide kaj havas bongustan viandon.

### ESPLORA KAJ TREJNA CENTRO POR FIŜBREDADO

Ĉar Ĉinio havas longan historion en bredado de dolĉakvaj fiŝoj, la Disvolva Programo de UNO kaj ĝia plenuma organizaĵo la Nutraĵa kaj Agrikultura Organizaĵo de UNO postulis, ke en

Ĉinio fondiĝu longdaŭra esplora kaj trejna centro por fiŝbredado. En junio 1981 oni fondis la Plurfakan Esploran kaj Trejnan Centron de Azio kaj la Pacifika Regiono por Fiŝbredado en la urbo Wuxi de Jiangsu-provinco ĉe la pitoreska lago Taihu. En la sama jaro ekfunkciis la unua kvarmonata kurso por fiŝbredistoj. Poste la dua kurso akceptis kursanojn venintajn el la azia kaj pacifika regiono.

En la centro instruas profesoroj kaj lektoroj de la Ŝanhaja Akvoproduktaja Instituto kaj esplorantoj de la Jangzi-rivera Akvoproduktaja Instituto. Ili aplikas instruan metodojn de prelego kaj praktika manipulado, por ke la kursanoj posedu la plurfakan entreprenan kaj administran teknikon por fiŝbredado, terkulturado kaj brutobredado kun la fiŝbredado kiel la centro, ellernu praktikan manipuladojn kaj administradon por lageta fiŝbredado, ekzemple, artefaran elovigon, uzadon de


fiŝnutraĵo kaj sterko kaj simile. La trejnado funkciis ĉefe en la centro kaj la antaŭurbo de Wuxi, kie la lageta fiŝbredado multe prosperas. Samtempe oni sendis la kursanojn al najbaraj Ŝanhajo, Suzhou kaj Zhenjiang por tie fari esploradon.

Nun en la centro lernas kursanoj el Koreio, Bangladeŝo, Tajlando, Birmo, Filipinoj, Nepalo, Malajzio, Srilanko, Fiĝioj kaj iuj aliaj insuloj en Pacifiko. Ili ĝenerale ricevis universitatan edukon, posedas fakajn sciojn pri biologio kaj akvoproduktaja scienco kaj havas praktikan sperton pri fiŝbredado jam de pli ol tri jaroj.

Certe, ankaŭ la ĉinaj sciencaj laborantoj pri akvoproduktaj lernas de alilandaj kolegoj novan fiŝbredan teknikon, ekzemple, retan kaj kestan fiŝbredon kaj fiŝbredon en superflua varma akvo el fabrikoj. Nun la reta kaj kesta fiŝbredado jam estas disvastigita al pli ol 20 provincoj kaj municipoj de Ĉinio.



## LOKOJ MENCIIATAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. *Yexian*
2. *Bohai-marbo*
3. *Jilin*
4. *Harbin*
5. *La insulo Putuo*
6. *Wutai-monto*
7. *Emei-monto*
8. *Jiuhua-monto*
9. *Xi'an*

**L**A nomo Qian Sanqiang, fama ĉina kernofizikisto, estas strikte ligita kun la ĉina atomenergia afero. Li laboras kiel vicestro de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Lia edzino He Zehui, unu el la plej famaj ĉinaj fizikistinoj, estas vicestro de la Instituto de Alt-energia Fiziko sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. Dum dekoj da jaroj ili ambaŭ multe kontribuis al la ĉina atomenergia afero kaj estis honoritaj per la nomo "Geedzoj Curie" de Ĉinio.

En sia infaneco profesoro Qian Sanqiang propraokule vidis kiel Ĉinio baraktis en mizero kaj humiligo sub la tretado fare de la imperiismaj potencoj. Li decidis helpi, savi kaj prosperigi Ĉinion per la scienco. Tiucele li elektis la fizikon kiel sian studobjekton en universitato kaj trapasis la eniran ekzamenon por ĝi. Post kiam li diplomitiĝis el la universitato Qinghua en 1936, li ekstudis spektroskopion en la fizika instituto de la tiama Akademio de Beiping. En 1937 li sukcesis en la ekzameno por la Laboratorio Curie ĉe la Universitato de Parizo kaj veturis Francion por perfektigi sian scion pri la kernofiziko ĝuante stipendion donitan de la Eduka Fonduso de la Ĉina-Franca Komisiono.

La elstara poldevena franca sciencisto S-ino M. Curie kaj ŝia edzo malkovris en 1898 du radioaktivajn, novajn elementojn polonio kaj radiumo. Dank' al la malkovro de la fenomeno de radioaktiveco fare de Becquerel kaj malkovro de radiumo, ili tri kune ricevis Nobelo-premion. Kaj la Universitato de Parizo fondis por ŝi la faman Laboratorion Curie de la Polonia

Instituto. Poste Frederic Joliot, bofilo de s-ino Curie, kaj ŝia filino Irene Curie daŭre gvidis la esploradon de la instituto, kio allogis multajn elstarajn sciencistojn. Tiam estis la antaŭvespero de grava eltrovado en la atomkerna scienco.

Frederic Joliot kaj Irene profunde simpatiis kun la tiama subpremata Ĉinio. Ili kun granda ĝojo akceptis Qian Sanqiang kaj fervore lin helpis. Direktate de la geedzoj Joliot, li senlace esploris la misteron de la atomkerno. Ĉiutage li ellitiĝis tuj ĉe tagiĝo, simple manĝis kaj haste iris al la laboratorio. Kelkiam por daŭrigi eksperimentadon li laboris eĉ nokte. La multaj antikvaĵoj kaj ĉarmaj pejzaĝoj en Parizo ne allogis tiun junan ĉinan studenton, kiu tute ensorbiĝis en la esplorado pri la atomkerno kaj tre malofte partoprenis en amuzado escepte de tre malofta filmorigardado en la semajnfino.

Dum lia studado en la universitato Qinghua, en lia klaso troviĝis studentino He Zehui, kiu havis elstarajn lernonotojn. Somere de 1936 ŝi diplomitiĝis el la universitato kaj komencis studi en la fizika fakultato de alta politekniko de Berlino. Ŝi doktoriĝis en 1940. Ŝi unuafoje pruvis la elastan kolizion inter pozitivaj kaj negativaj elektronoj en nebulkamero. Ekster sia patrujo ŝi korespondis kun Qian Sanqiang dum longa tempo kaj venis Parizon en 1946. Tie direktate de Joliot kaj Curie ŝi kune kun Qian okupiĝis pri esplorado de kernofiziko. Ili geedziĝis ĝuste tiutempe.

En la tiama mondo multaj kompetentuloj opiniis, ke eblos spliti atomkernon nur en du pecetojn. Sed Qian kaj He opiniis,

GU MAINAN:

# La "Geedzoj de



ke la kono de la homaro pri la naturo estas senlima, kaj oni ne devas sin kateni per la konceptoj de antaŭuloj. El la fakto, ke atomkerno eligas grandegan kvanton da energio dum sia splitiĝo, ili konceptis, ke en tiel drasta ŝanĝiĝo eble kaŝiĝas alispeca formo de splitiĝo. Kiam ili kun du junaj francaj sciencistoj esploris pri la splitado de urania kerno per atomkerna emulsio, ili trovis, ke ekzistas ebleco spliti uranian kernon en tri pecetojn. Por konfirmi tion ili faris dekmilojn da observadoj. Sen helpo de komputilo ili devis fari grandkvantan kalkuladon por ĉiu observo. Post peniga laboro ili fine trovis en la vintro de 1946, ke en splitado de ĉirkaŭ tricent kernoj aperis unu, kiu splitiĝis en tri pecetojn, inter kiuj du estis pezaj, dum la tria malpeza kaj ofte eljetiĝis vertikale al la antaŭaj. Tio estis la fama fenomeno de splitado de urania kerno en tri pecetojn. Iom poste, t.e. en la fino de la sama jaro, He Zehui unuafoje malkovris la fenomenon de splitado en kvar pecetojn. Ĉiuj ĉi malkovroj profundigis la konon de la homaro pri la splitiĝo de atomkerno kaj estis alte laŭdataj de la francaj sciencistoj kiel la unua signifoplena laboro de la laboratorio Curie post la Dua Mondmilito. En 1947 ili klarigis la fenomenon per vidaĵo, ke en la palpebruma momento antaŭ




# Curie'' Ĉinio



la splito la kerna materio ŝanĝiĝis en la formon de haltero kaj la malgranda parto en ĝia mezo fariĝis la tria peceto. Tiu klarigo tute koincidis kun la eksperimenta rezulto akirita per pli nova tekniko de eksperimento post dek jaroj. Ĝi estis akceptita de ĉiulandaj fizikistoj. Dum restado en Francio li publikigis pli ol 40 disertatojn. Sekve de tio, ke li estis honorita per la titolo de ŝtata doktoro en 1940, li ricevis la fizikan premion de la Franca Akademio de Sciencoj en 1946.

Dank' al liaj eminentaj atingoj la koncerna instituto de Francio esperis, ke Qian Sanqiang kaj lia familio plu loĝos en Francio. Ili tamen deziris reveni patrolanden kiel eble plej baldaŭ kaj fari efikan laboron por la disvolviĝo de la ĉina atomkerna scienco. La geedzoj Joliot kaj Curie ĝoje konsentis, ke ili forlasu Francion malgraŭ ilia malvolonto, aŭdinte la klarigon de Qian Sanqiang. Antaŭ ilia forveturo Qian ricevis noton subskribitan de siaj ĝeinstruistoj, kie estis legebla: "Ni diru kun nenia troigo, ke li estas la plej eminenta el la sciencistoj direktitaj de ni en la lastaj dek jaroj." En 1948 Qian kaj lia edzino kune revenis patrolanden.

Tiam Ĉinio estis multe postĝinta en la scienco pri la atomkerno. En la Instituto pri Atoma Scienco sub la Akademio de Beiping laboris nur kvin personoj



*Ges-roj Qian kaj ilia filo*

inkluzive de la geedzoj Qian. La oficejo havis nur du ĉambrojn kaj cetere malhavis eĉ la plej fundamentajn eksperimentajn aparatojn. Antaŭ tio la geedzoj Qian decidis mem konstrui la instituton. Post nelonge naskiĝis la nova Ĉinio. Tio, ke la popola registaro alte taksas la disvolviĝon de sciencoj, firmigis al ili la fidon. Ili aĉetis aŭ mem fabrikis necesajn instalaĵojn kaj kulturis sciencajn laborantojn kune kun aliaj sciencistoj. En 1955 la Instituto de Moderna Fiziko sub la Ĉina Akademio de Sciencoj ekhavis rudimentan skalon kaj pli ol 150 funkciulojn.

Por sendepende disvolvi la ĉinan atomkernan sciencon Ĉinio devis mem fari aparatojn, instalaĵojn kaj kemiajn reakciilojn. Tiurilate la atomkerna emulsio estas necesa sondilo por esplori kernofizikon. K-dino He Zehui ja estas ĝia unua fabrikinto. En la unuaj jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio nia lando alfrontis sufiĉe grandan malfacilon pro manko de materialoj. Ŝi decidis per siaj propraj fortoj esplori kiel fabriki ĝin. Ŝi kune kun siaj

helpantoj elspezis kvin jarojn, konsultis la sciencajn dokumentojn, kiujn havis nia lando en tiu tempo, faris centojn da eksperimentoj kaj fine sukcese fabrikis ĉinan atomkernan emulsion. Ĝuste pro tio ŝi kune kun siaj du helpantoj gajnis la sciencan premion donitan en 1956 de la Ĉina Akademio de Sciencoj.

Ekde 1955 la ĉina atomenergia afero eniris en la periodon de grandpaŝa disvolviĝo. Alian fizionomion ekhavis la ĉina atomkerna kaj atomenergia sciencoj. Muntiĝis la unua ciklotrono, ekfunkciis la unua nuklearko, senĉese disvolviĝis la esplorado pri la atomkerna scienco kaj ĉiam pli vastiĝis la vicaro de sciencistoj. Qian partoprenis en la gvidado super la sciencia esplorado kaj He gvidis la esploran laboron pri neŭtrona fiziko kaj nuklesplita fiziko.

En 1964 Ĉinio sukcese eksplodigis sian unuan atombombon, kio markis la gravan atingon de la ĉina atomenergia afero kaj fortigis la povon de Ĉinio rezisti kontraŭ agresado. Samtempe ĝi akiris ankaŭ sukcesojn profitajn



## **ĈINA KARIKATURA FILMO PREMIITA EN OTAVO**

La ĉina karikaturna filmo "Simioj Provas Elakvigi la Lunon" farita de la Belarta Studio de Ŝanhajo gajnis la unuaklasan premion por infanaj filmoj en la Sesa Internacia Festivalo de Karikaturnaj Filmoj en Otavo, kiu okazis inter la 13-a kaj la 18-a de aŭgusto 1982. La viglaj kaj gajaj simioj en la filmo ege ĝojigis la kanadajn infanojn.

En la festivalo prezentiĝis pli ol 400 filmoj el 29 landoj, inkluzive de Kanado, Ĉinio, Belgio, Ĉeĥoslovakio, Francio, Hungario, Pollando, Svedio, Britio, Usono, Sovetunio kaj Jugoslavio.

## **SVEDAJ MUZIKISTOJ PREZENTIS EN ĈINIO**

La sveda kvarteto Crafoord kaj la sveda hoboĵisto Per-Olof Gillblad unuafoje vizitis Ĉinion de la 20-a de aŭgusto ĝis la 4-a de septembro, donis 8 prezentadojn en Pekino, Hangzhou kaj Ŝanhajo kaj estis varme akceptitaj de la ĉinaj spektantoj.

La svedaj muzikistoj ludis la kordan kvarteton n-ro 5 de la fama sveda komponisto Stenham-

mar. La muzikajo el svedaj folkloraj kanzonoj profunde impresis la ĉinajn spektantojn. Ili ludis ankaŭ verkojn de Mozart, Beethoven, Mendelssohn kaj ricevis varman aplaŭdadon.

La kvarteto Crafoord fondiĝis en 1969. Ĝia unua violonisto Gert Crafoord nun estas profesoro de la Ŝtata Muzika Akademio en Stokholmo, gvidanto de la Filharmonio de Stokholmo kaj membro de la direktantaro de la Sveda Reĝa Konservatorio.

## **ĤORO DE LA LERNEJO OLDUTUN EN PEKINO**

La ĥoro de la lernejo Oldutun de Islando faris prezentadon en Pekino de la 31-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto. La islandaj kantistetoj prezentis islandajn kaj alilandajn kantojn por miloj da ĉinaj spektantoj. La gastetoj amuzkunvenis kun la Geknaba Ĥoro de Radio Pekino.

La lernejo havas 600 lernantojn. Por levi muzikan nivelon de la lernantoj en la lernejo fondiĝis la ĥoro en 1965. Ĝiaj programeroj estas ofte disaŭditaj kaj telesenditaj. Ĝi ankaŭ faris turneon eksterlande plurfoje.

## **GVIDANTO DE LA ĈINA RUĜ- KRUCA ASOCIO AKCEPTIS JAPANAJN AMIKOJN**

Yang Chun, vicprezidanto de la Ĉina Ruĝ-kruca Asocio, akceptis la japanan delegacion el la komitato por rememorigi pri japanaj, ĉinaj

kaj koreaj laboruloj, kiuj mortis dum la konstruado de akvorezervejo, konata kiel Sagami-lago, inter Tokio kaj Yokohama. Li havis amikan interparolon kun la japanaj gastoj.

La akvorezervejo estis konstruita dum la agresiva milito de Japanio kontraŭ Ĉinio por liveri elektron al ĝia milita industrio en Yokohama. La materialoj donitaj de japanaj amikoj informis, ke japanaj militaristoj kaptis 289 laborulojn de Ĉinio kaj sendis ilin al la konstruejo. 28 el ili mortis pro molestado. Perdus sian vivon dum la konstruado ankaŭ dekoj da koreaj kaj japanaj laboruloj.

Dum la akceptado Noriaka Sugimoto, estro de la delegacio, diris, ke por ke oni neniam forgesu la suferojn kaŭzitajn de la japanaj militaristoj al la ĉina, japana kaj korea popoloj, loĝantoj ĉirkaŭ la akvorezervejo propravole organizis la komitaton por rememorigi pri la mortintoj. Ili kolektis multajn informojn pri la mortintoj kaj donis ilin al la publiko. Kvar ceremonioj por rememorigo estis faritaj kaj monumento al la mortintoj estis fondita en 1979. Ĉi-foje la delegacio venis al Ĉinio por kolekti pli da informoj pri la mortintaj ĉinaj laboruloj.

En la nomo de la Ĉina Ruĝ-kruca Asocio Yang Chun dankis la japanajn amikojn pro ilia signifoplena laboro por la amikeco inter Ĉinio kaj Japanio.

al la nacia ekonomio en aplikado de nuklea tekniko kaj izotopoj, kiel ekz., al la kotono Lumian N-ro Unu, la tritiko Emai N-ro Ses, kaj konservado de agrikulturaj produktaĵoj per radiado.

La atomenergia afero de la nova Ĉinio komenciĝis de nulo kaj

akiris sukcesojn unu post alia. Inter la elstaraj sciencistoj, kiuj faris grandajn kontribuojn per la tuta koro tiuflanke, la geedzoj Qian staras ĉe la kapo.

Nuntempe la geedzoj ankoraŭ persistas en la scienca esplorado, malgraŭ ke ili ambaŭ jam superis

la aĝon de 60 jaroj. Qian Sanqiang diligente laboras por disvolviĝo de matematiko kaj fiziko de Ĉinio, kaj He Zehui gvidas esploradon pri kosmaj radioj. Ili sentas sin senlime ĝojaj, vidante la rapidan kreskon de la junaj kaj mezaĝaj sciencistoj kaj teknikistoj.




# En la 67-a Universala Kongreso

Fotoj de la Ĉina Esperanto-Delegacio



Zhang Qicheng (meze), la estro de la Ĉina Esperanto-Delegacio, salutas la kongreson.

Shen Lan (la dua de dekstre), la unua sekretario de la ĉina ambasadorejo al Belgio, interparolas kun Grégorie Maertens, la prezidanto de UEA (la unua de maldekstre), kaj Flóra Szabó-Felső (la dua de maldekstre), la ĝenerala sekretario de UEA, en la akcepta kunveno ĉe la inaŭguro de la kongreso.





Liu Junfang (la tria de dekstre), raportisto de Radio Pekino, interparolas kun kongresanoj.




Membroj de la Ĉina Esperanto-Delegacio Zhu Ming-yi kaj Qiu Zimin (la unuaj du de maldekstre) en la inaŭguro de la kongreso



Zhang Qicheng, la ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo, en la kunveno de la komitato de UEA








Zhang Qicheng interparolas kun rumana samideano.



Ĉinaj esperantistoj en Lier



Entomologo prof. Io Chou (la unua de dekstre), membro de la Ĉina Esperanto-Delegacio, gastas ĉe sia belga amiko d-ro Smet.

Ĉina kantistino Qiu Zimin (dekstre) kaj pola esperantistino



La 67-a UK okazis inter la 25-a kaj la 31-a de julio en Antverpeno, Belgio. Ĝin partoprenis 1 899 esperantistoj el 50 landoj, inkluzive de Ĉinio.

Dum la kongreso gesamideanoj diskutis pri diversaj temoj, faris prelegojn, raportis pri Esp-movado en sia lando kaj per tio pliprofundigis la amikecon inter si.



La Ĉina Esperanto-Delegacio, la ĉefredak-  
toro de "Esperanto" Simo Milojevic (la  
kvara de maldekstre) kaj aliaj antaŭ la kon-  
gresejo



La radiostacio servanta al esperantistoj

Libro-servo en la Grafika Cen-  
tro de UEA dum la kongreso





CELEBRANTE LA 70-AN  
DATREVENON DE LA  
NASKIĜO KAJ LA 35-AN  
DE LA FORPASO DE  
**VERDA MAJO**  
(1912—1947)

LA ĈINA ESPERANTO-ELDO-  
NEJO APERIGIS KOLEKTON  
DE ŜIAJ ESPERANTAJ VER-  
KOJ KAJ TRADUKOJ

## Verkoj de **VERDA MAJO**

Verda Majo estas fama japana esperantistino, internaciisma batalanto kaj granda amiko de la ĉina popolo. En 1937 ŝi venis al Ĉinio kaj kune kun la ĉina popolo ŝi oponis kaj batalis kontraŭ la agresa milito fare de la japanaj militaristoj kontraŭ Ĉinio. Kiamaniere ŝi, kiel japanino, povis vivi kaj labori en Ĉinio batalanta kontraŭ japanaj agresantoj? Malgraŭ ĉiaj malfacilaĵoj ŝi faris meritan kontribuon al la progresema afero de la homaro kaj la amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj. La libro enhavas ĉiujn jam trovitajn ŝiajn Esperantajn verkojn kaj tradukojn, kun enkonduko de Ĵelezo. Estas enmetitaj ankaŭ kelkaj valoraj fotoj pri ŝi.

La libro estas frukto de internacia kunlaborado. En la kompilado s-ro Miyamoto Masao kaj aliaj kelkaj esperantistoj en Japanio donis grandan helpon.



Numero: 10-Es-1653

Formato: 148 x 210 mm.  
510 pĝ. bind.

Prezo £4.20 US\$8.50  
RMB¥13.00

Mendu ĉe: Libroservo de UEA  
Peranto de EPC

aŭ Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj  
(GUOJI SHUDIAN), P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

## Servemaj Frizistinoj

“Mi laboras por beligi la virinojn per hararanĝoj, por ke ili venu ĝoje kaj foriru kontente,” diris frizistino Fu Huiyi, kombante al mi la harojn.

La frizejo Silian, en kiu servas Fu, estas la plej granda en Pekino kaj sidas sur ties plej movoplena strato Wangfujing. En la duetaĝa domo laboras 112 gefrizistoj. La porvirina fako funkcias en la supra etaĝo, kaj tie la plejparton de la taskoj plenumas frizistinoj. Ili servas al la klientoj per tondado, frizado, brovordigado, manikurado kaj perukopreparado. Ili faras hararanĝojn laŭ profesio, aĝo, staturato, vizaĝformo kaj aliaj karakterizaĵoj de la kliento. Tial oni nomas ilin lertaj beligistinoj.

Por beligi aliajn ili vere faris multajn klopodojn. Ili lernis fari

tradiciajn hararanĝojn de Ŝanhajo, ĉerpis bonajn ecojn el la eksterlandaj hararanĝoj kaj projektis nombron da belaj hararanĝoj ŝatataj de la pekinaj virinoj. Ĉi-sube mi rakontas al vi kelkajn historietojn pri tio.

Iutage, kiam la frizistinoj apenaŭ finis sian taglaboron, haste venis junulino por friziĝi. La deĵoranto diris: “Mi petas vian pardonon, sed bonvolu veni morgaŭ.” Ŝi iom hezitis kaj respondis honteme: “Morgaŭ mi edziniĝos. Oni diras, ke via frizejo faras spiralajn pendbuklojn, tial mi venis ĉi tien de malproksime.” Aŭdinte tion, frizistino Bo Shulan pensis, ke la edziniĝo estas grava afero por la fraŭlino en la tuta vivo, do ŝi preferis frizi la junulinon ol vidi ŝin foriri malespere. La frizistino alpa-

sis kaj diris: “Bonvolu eniri, mi servos al vi.” Post du horoj, kiam la junulino vidis en la spegulo siajn bele frizitajn harojn, ŝi ekridetis elkore. Poste la novedzino speciale portis al la du frizistinoj bombonojn pro la geedziĝo, laŭ la ĉina kutimo.

Ne unufoje okazis tia afero en la frizejo. Iam venis novedzino kune kun la novedzo por esprimi sian dankon al frizistinoj.

“Nun ni provludas dramon. Mi ludas la rolon de virino de la tridekaj jaroj,” diris iu aktorino al frizistino Fu Huiyi. “Rigardu, mi portas malnovtipan ĵaketon, veluran jupon kaj paron da altkalkanumaj ŝuoj. Kian hararanĝon mi devas havi laŭ la tiutempa kutimo?”

Ofte venas tiaj klientoj, kiuj petas la frizistinojn projekti por

*Fu Huiyi servas al kliento.*



*Ĉambro por harsekigo*





ili tondofasonojn laŭ iliaj postuloj. Antaŭ ol fari hararanĝojn la frizistinoj interkonsiliĝas kun la frizotinoj kaj kiel eble plej bone kontentigas iliajn postulojn.

Fu Huiyi estas 49-jara kaj okupiĝas pri frizado jam 38 jarojn. Interkonsiliĝinte kun la aktorino, ŝi komencis sian laboron. Post nelonge la nuntempa aktorino jam fariĝis kiel virino de la tridekaj jaroj. La aktorino ĝoje diris al Fu: "Dankon, tiel aranĝita tondofasono certe kontentigos mian reĝisoron."

Foje venis al la frizejo kamparano kun sia filino. Li diris al frizistino: "Mia filino estas jam 18-jara. Pro mia malzorgemo brulvundo perdigis al ŝi la kapharojn en ŝia infanaĝo. Ŝi ofte larmas pro tio. Mi petas vin prepari por ŝi perukon."

Aŭdinte liajn vortojn, la ĉeestantaj klientoj kaj frizistinoj sentis grandan simpatian al ŝi. Konsiderante, ke la junulino loĝas en la kamparo, la frizistino faris al ŝi simple kombitan kaj okulplaĉan perukon. La bela

vizaĝo sub la brilnigra peruko aspektis pli ĉarma.

La frizistinoj ofte frizas eksterlandajn gastojn kaj ricevas iliajn laŭdojn. Iu eksterlandano vojaĝis en Ĉinio dum unu monato, tamen ŝi ne lavis siajn harojn, ĉar ŝi timis, ke ŝiaj frizitaj bukloj estus perditaj. Reveninte al Pekino, ŝi venis al la frizejo pro ĝia renomo, tamen kun iom da dubo. Kiam oni bone faris buklojn kiel la antaŭaj, rideto aperis sur ŝia vizaĝo. Ŝi esprimis multajn dankojn al la frizistino.

Lerte frizitaj haroj povas ripari iujn mankojn de vizaĝo aŭ kapformo. Fojfoje venis al la frizejo pli-ol-30-jara virino kun du longaj harligoj. La frizistino demandis ŝin, kian hararanĝon ŝi volas, sed ŝi hezitis respondi. Post pridemandado oni eksciis, ke maldekstre de ŝia okcipitosto estas cikatro. Por kovri tiun mankon ŝi ĉiam havis harligojn. Ŝi tre enviis frizitajn hararojn de siaj kamaradinoj, tamen ŝi timis, ke malkaŝiĝos la cikatro post fortonto de la harligoj. Juna frizistino Wang Xiuling mallonge

fortondis ŝiajn harojn supre de la cikatro kaj faris el ili grandajn buklojn. Rigardante sin en spegulo, la klientino diris mire: "Kiel lertaj manoj! Neniun mankon oni trovas."

La frizistinoj servas ne nur en la frizejo, sed ankaŭ en hejmoj de klientoj. Tradukistino Xia estas purema kaj volis iom beligi sian kapon, sed ŝi suferas de paralizo kaj ne povas viziti la frizejon. Ŝi ofte ĉagreniĝis de tio. Post kiam Xia legis pri bonaj faroj de Fu Huiyi en la "Pekina Vesperjurnalo", ŝi skribis leteron al Fu. En la letero ŝi diris: "Kvakam mi estas kripla, tamen mi ankoraŭ amas la vivon. Mi forte esperas, ke vi venos frizi min." En la sama vespero, en kies tago Fu ricevis la leteron, ŝi venis al la hejmo de Xia kun friziloj kaj faris al ŝi hararanĝon tre plaĉan al Xia. Post tio frizistino Fu regule vizitis ŝin. En la dankletero Xia diris: "Vi donis al mi grandan konsolon."

Iuj junulinoj ne sciis longe teni la frizitajn buklojn kaj plendis pri ilia deformiĝo post lavado, tial ili sendis leterojn por

#### *Farado de peruko*





# Mi bredas cervojn

de SHI SHUZHEN

*La aŭtoro estas bela, 26-jara junulino kun inteligenta kaj kvieta aspekto. Si estis diplomita el mezlernejo en julio de 1975 kaj nun laboras en la Cervobredejo Longtanshan de la urbo Jilin.*

**La Red.**

Frumatene, pelante gregon da cervoj, mi kaj miaj kamaradoj venis al la monto Longtanshan. Sur la montodeklivo peze ombras la prosperaj arbaroj. Brilas la herboj per roso. Kvieta manĝas herbojn iuj cervoj kaj ĝoje petolas la aliaj. Ho, kiel rava vidaĵo!

Mia patro estas maljuna laboristo de la cervobredejo. Jam antaŭlonge mi aŭdis de li, ke la junkorno de cervo estas tre valora tonika medikamento por la homoj suferantaj de debileco, malvigleco, palpacioj aŭ sen-

dormo. Post lernohoroj mi ofte rigardis la cervojn kune kun miaj kamaradoj sur la monto. Kiel amindaj estis la cervoj! Sur iliaj brunruĝaj korpoj videblis blankaj makuloj, similaj al ume-floroj, kaj la ruĝaj kornoj impresis kiel paroj da arbobranĉoj. Plezurigaj la cervidoj! Ili ĝoje petolis, kiam apude troviĝis ne-niu homo, sed antaŭ homoj ili aspektas tiel timemaj, kvazaŭ knabetoj kaj spritaj kaj petolaj. La laboristoj cervobredaj tre similis al majestaj generaloj, kun pajloĉapeloj sur la kapo kaj

sako sur la dorso. Ili krakigis la vipon, komandante la cervaron. "Kiel bone estos, se mi mem fariĝos cervobredisto iutage," mi tiel aspiris.

Mi vere fariĝis cervobredisto en julio de 1978! Realiĝis mia revo, kaj mi kore ĝojis. Sed la afero iris ne tiel glate, kiel mi supozis. Mia ĉefa laboro estas nutri kaj paŝti la cervaron. Somere kaj aŭtune, antaŭ la sunleviĝo, mi kaj miaj sep kamaradoj pelas 240 cervojn sur montojn, tretante rosplenajn herbojn.

esprimi malkontenton al la frizejo. Ricevinte tian leteron, la frizejo ĉiam sendis sian spertan frizistinon al la kliento por transdoni la ĉi-rilatan teknikan scion.

Fu Huiyi rakontis al mi ankorau aferon. Iutage ŝi kaj ŝiaj kamaradinoj estis senditaj por frizi reprezentantinojn de la Polola Kongreso. Dum ilia frizado iu juna reprezentantino atente observis ĉeflanke. Fu pensis, ke eble ŝi atendas por friziĝi, sed la lasta diris: "Ankaŭ mi estas frizistino, mi volas lerni de vi."

Estis neatendite por Fu, ke inter la reprezentantoj troviĝas


frizistino kaj tiu eĉ volas lerni de ŝi frizadon. Tio multe kortuŝis ŝin, ĉar en tiu momento ŝi rememoris pri siaj tragediaj jaroj en la malnova socio.

Fu Huiyi diris, ke tiam ŝia patro estis maldungita de la mastro kaj ŝi havis multajn gefratojn, tial en la aĝo de 11 jaroj ŝi jam devis eklabori ĉe barbiro por vivteni la tutan familion. Ĉiutage ŝi forlasis la hejmon frumatene kaj plenumis pezajn laborojn ĉe la mastro, kiuj daŭris ĝis malfrua vespero. Ŝi preparis por la mastro manĝon, lavis vestojn kaj purigis la bar-

birejon kaj ĉambrojn. Ŝi povis lerni iom da tekniko nur ŝtele. Nun pliboniĝis la laborkondiĉoj de frizistoj kaj plialtiĝis iliaj salajroj kaj pozicio. Antaŭ kelkaj jaroj Fu estis promociita kiel la unua majstro-frizistino en Pekino, kaj nun ŝi estas membro de la Servista Sindikato de la Orienta Kvartalo de Pekino, zorganta pri la laboro de laboristinoj.

Mi forlasis la frizejon kaj iris sur la vojo. Antaŭ mi denove aperis la figuro de Fu Huiyi. Mi bone komprenas nun, kial Fu kaj ŝiaj kolegoj tiel amas sian laboron kaj varme servas al la klientoj.





Ofte fariĝas tiel, ke estas serena tago ĉe nia eliro, sed alŝvebas nigraj nuboj, do sekvas pluvego. Tiam ni ja malsekiĝas ĝisoste. Falas vespera krepusko. Pikate de svarmo da moskitoj, niaj vizaĝoj ŝveliĝas. Printempe kaj vintre oni tenas la cervojn en staloj. Ĉiu zorgas pri sesdek cervoj kaj devas purigi la stalon ĉiutage.

La cervoj aspektas obeemaj, sed fakte ne tiel simple estas trakti ilin. Restas sovaĝaj la cervoj. Ili estas rapidkuraj kaj timemaj ĉe surprizo. Iun posttagmezon, kiam mi paŝtis cervojn sur la monto, subite ekfulmotondris kaj tuj poste ekpluvegis. Kelke da cervoj surprizitaj elgrupiĝis kaj freneze ekgalopis, sekvante ilin diskuris ankaŭ la aliaj. Mi maltrankviliĝis. Kriante, mi postkuris ilin. Sed ju pli mi postkuris ilin, des pli rapide ili kuregis. Ho ve, la tuta grupo da cervoj estis tuj disiĝonta, kiam la taĉmentestro Zhang alvenis. Li aplombe, pelante la cervojn ankoraŭ ne disiĝintajn, atingis la aliajn, tiel ke ili engrupiĝis unu post alia.

Poste taĉmentestro Zhang diris al mi, ke oni devas esti tre paciencna en paŝtado. La cervoj estas timemaj, manĝemaj kaj grupiĝemaj, tial oni devas trejni kelkajn cervojn en gvidcervojn. Kiam la gvidcervoj forkuras, oni do allogas ilin per sojfaba rekre-

mento. Kiam engrupiĝis la gvidaj, ilin sekvas la aliaj.

Por ke la junaj laboristoj estu pli kapablaj, nia laborejo ekfunkciigis trejnajn kursojn, kiun gvidis fakuloj. Ili lekciis tre bone kaj ĉiam kombinis la teorion kun la praktika laboro. Samkiel miaj kolegoj, mi tre ŝatis iliajn lecionojn. Post ĉiu leciono mi restudis la lernaĵojn kaj relegis en miaj notkajeroj, por kio mi iam eĉ rezignis filmorigardon. Nun post la kurso mi jam posedas la elementajn sciojn pri la vivo de la cervoj, pri iliaj paŝtado kaj bredado kaj pri prevento kaj kuraco de iliaj oftaj malsanoj. Mi akiris bonan sukceson.

Posedante profesiajn sciojn, kaj post praktika ekzercado, mi

scias kion mi devas fari, kiam diskuras cervoj, kaj scias kiel trakti la malobeemajn cervojn. Ni havas iun junan vircervon. Ĝi, kun grandaj blankaj makuloj, estas vigla kaj petola. En la unuafoja renkontiĝo ĝi ja streĉis siajn orelojn, larĝe malfermis la okulojn kaj singardeme rigardis min, kvazaŭ ĝi estus preta sin ĵeti en batalon. Paŝtate sur la monto, ĝi ĉiam iris ĉe la rando kaj, iom surprizite, tuj forkuris. Iam ĝi eĉ intence rondkuris ĉirkaŭ la grego. Ni ĉiuj nomis ĝin "bubaĉo". Por ĝin trakti mi kiel eble plej multe kontaktis kun ĝi, kaj kun la tempopaso ĝi iom post iom perdis la fremdecon al mi. Foje mi rimarkis, ke ĝiaj okuloj ne tiel brilas kiel antaŭe. Ĝi gape staris

#### *Shi Shuzhen nutras cervojn.*



apude dum aliaj bestoj ludis sur la herbejo. Ekzameninte, mi certigis, ke ĝi suferas de intesta inflamo. La veterinaro bone kuracis ĝin kaj mi zorgeme flegis ĝin. En tiuj tagoj mi ĉiam pretigis por ĝi farunan kaĉon en la hejmo kaj portis la manĝaĵon al la stalo, kie mi zorgeme ĝin manĝigis. Kiam la malsano iom moderiĝis, mi preparis por ĝi facile digesteblan nutraĵon. Resaniĝinte, ĝi intimiĝis kun mi. Nun ĉiufoje, kiam mi eniras en la stalon, ĝi tuŝetas min per la buŝo, lekas min kaj karese frotas mian korpon per sia longa vila kolo. Rigardante tiun fortikan kaj spritan etulon, mi droniĝis en ĝojo. Miaj kamaradoj ŝercis, ke mi amikiĝis kun la "bubaĉo". Pro mia konduto nia estraro honoris min per la titolo "eminenta cervobredisto".

Samtempe kun tio, mi ekhavis veran amanton, t.e. kamaradon Gao Shenxin. Li estas fervojisto, tri jarojn pli aĝa ol mi. Ĉe nia renkontiĝo mi sciigis lin, ke mi estas cervobredistino kaj ke mia profesio estas tre ordinara. Li diris, ke la cervobredado same kiel lia laboro, riparado de varvagonoj, estas bezonata de la ŝtato kaj popolo. Ni geedziĝis en

la komenco de 1980 kaj nun jam havas filinon, baldaŭ du-jaran. De post kiam mi fariĝis tri monatojn graveda, oni en la laborejo postulis de mi nur malpezajn laborojn. Mi denove ekpaŝtis la bestojn nur kiam mia filino atingis unu kaj duonan jarojn. Rimarkinte, ke mi laboras de matene ĝis vespere, mia edzo memvole dommastrumas. Matene li portas mian filinon al la infanvartejo kaj vespere portas ŝin hejmen. Kiam mi hejmenrevenas, li tuj pretigas la tablon por vespermanĝi. Ni ambaŭ estas laboristoj de la dua grado kaj ĉiumonate enspezas pli ol cent juanojn, inkluzive subvenciojn kaj kromsalajron. Kompare kun aliaj laborantoj, nia enspezo estas malalta. Tamen ni racie elspezas por vivtenado, tiel ke ni povas deponi dudek juanojn ĉiumonate. Nun ni jam deponis 500 juanojn. Tamen pro malvasteco de nia loĝejo, kiu grandas nur 13 kvadratajn metrojn, ni portempe ne volas aĉeti grandajn meblojn. Antaŭ nelonge mia edzo aĉetis por mi biciklon. Post laborhoroj ni biciklas al la urbo por rigardi filmon. Mia edzo ŝatas legi. Li legas kaj teknikajn librojn kaj literaturajn


verkojn. Iafoje li ankaŭ ludas korbopilkon. Nia filineto ege plezurigas nin en la postlaboraj horoj.

Kun la tempopaso nia cervobredejo disvolviĝas pli kaj pli. Ĉe ĝia fondiĝo en 1949, tie estis nur ducent cervoj, sed nun jam 1 200, kaj krome nia bredejo jam provizis la ŝtaton per pli ol trimil vircervoj por generado. Pli-boniĝas ankaŭ niaj laborkondiĉoj. Nun ĉiuj staloj estas rekonstruitaj el brikoj kaj tegoloj, kaj la planko estis pavimita el brikoj. Oni konstruis por mi akvokondukilon, pro kio ni ne plu bezonas porti akvon de malproksime por trinki la bestojn, kaj en varmega somero ni povas duŝi la cervojn. Krom bredado, ni ĉiujare prilaboras 500 kilogramojn da cervaj junkornoj.



*Shi Shuzhen (dekstre) purigas cervostalon.*





*Sportkunveno de malliberuloj*

## NEORDINARA SPORTKUNVENO

Estis klara kaj ĉarma tago. Mi, kiel raportisto, vizitis malliberejon en la urbo Harbin. Kiam mi eniris en la korton de la malliberejo, aŭdiĝis tamburado kaj muziko kaj iris homoj tien kaj reen.

Tie komenciĝis sportkunveno de malliberuloj. En muziko pli ol 400 sportantoj en diversaj koloraj vestoj eniris la sportejon, kaj ilin kondukis la gvidkolono portanta rubandon kun la nomo de la sportkunveno kaj alte tenanta ruĝajn flagojn. Ili viglani-me marŝis preter la podio.

Sur la podio sidis provosoj en blankaj vestoj kaj respondeculoj de aliaj malliberejoj. Venis ankaŭ pli ol 60 invititoj kaj familianoj de la malliberuloj.

Ĉirkaŭ la sportejo estis pli ol mil malliberuloj en grizaj vestoj, kiuj ĉiuj sidis sur taburetoj. Inter ili iuj fumis, dum aliaj ĝuis

malvarmajn trinkaĵojn, kiujn ili mem faris. Plejparte estis junuloj. Ili apartenis al ok grupoj, apud ĉiu sidis unu aŭ du gardistoj. La konkursantoj, elektitaj de sia grupo, konsistigis 33% de la 1500 malliberuloj.

Ankaŭ la juĝistoj, signalistoj, tempo-mezuristo kaj laŭparolisto estis malliberuloj. La kunvenon oni preparis pli ol du monatojn. Por ĝi la malliberejo aĉetis sportilojn kaj donacojn kontraŭ 1 600 juanoj. Antaŭ nelonge finiĝis la flugpilka, tablotenisa kaj korbopilka konkursoj. Kaj nun iras la konkurso de atletiko.

La sportkunveno havis sume 54 konkursajn disciplinojn, inter kiuj estis 100-metra, 200-metra, 400-metra, 800-metra, 1 500-metra kaj 5 000-metra ebenkuroj kaj barierkurado, stafetkurado, marŝado, pezglob-ĵeto, altosalto, longosalto kaj ŝnurtirado. Krome, ili speciale aldonis du disciplinojn laŭ la fiziologiaj ecoj de maljunaj malliberuloj: 60-metra kurado kun globo en mano kaj

CAO BAILONG:

## EN KAJ EKSTER

# LA

## MALLIBEREJO

60-metra kurado kun fiŝkaptilo en mano.

Komenciĝis la konkursoj. La rigardantoj senĉese kriadis "Rapido" por la kurantoj de sia grupo kaj forte tamburis por kuraĝigi. Foje iu stafeto subite falis, transprenante la bastonon. Li tuj leviĝis kaj postkuris tutforte. Tuj ekbruis manklakado kaj ridado de la spektantoj.

En la 100-metra kurkonkurso la 24-jara sportanto Gao Weibin per 11"5 rompis la rekordon kreitan de li mem en la pasinta sportkunveno. En la ĉi-foja sportkunveno li gajnis la unuan lokon en tri disciplinoj. Iu bela knabino sur porgasta sidloko de tempo al tempo manklakis kaj mansvingis al li. Ŝi estis lia 19-jara fratino Gao Weiyin, laboristino de la vaporturbina fabriko. Hodiaŭ ŝi ripozis kaj speciale venis por rigardi, kaj krome ŝi portis nutraĵon al sia frato. Ŝi klarigis al mi, ke en la 18-jara aĝo ŝia frato estis kondamnita al dek-jara mallibereco pro tio, ke



*Kurado*



*Estro de la malliberejo donas premion al la venkintoj.*

## EDZIĜA CEREMONIO DE TROMPISTO

En nova domo regis ĝojo. La novedzo disdonis al la gastoj bombonojn, dum la novedzino regalis ilin per cigaredoj, teo kaj kukoj. Nun okazis la geedziĝa ceremonio por la 31-jara elektristo Yang Yingzhong kaj la 26-jara hartondistino Ma Liying. La gastoj ĝojis pro ilia feliĉo. Kiu povus kredi, ke antaŭ duonjaro li estis malliberigita por dek jaroj pro trompado!

La 11-an de majo, kiam provoso rakontis al mi pri la ŝanĝiĝo de la obstina malliberulo Yang Yingzhong, lia sekretario eniris la oficejon kaj diris: “Yang Yingzhong telefonis, ke vi morgaŭ partoprenu en lia edziĝa ceremonio.”

La sekvan tagon mi kaj la provoso do fariĝis honoraj gastoj ĉe la ceremonio.

Jam 12-jara, Yang Yingzhong fariĝis vagabondo kaj ekvivis el ŝtelado. Eĉ liaj gepatroj ne povis obeigi lin. Poste lia patro mortis kaj lia patrino reedziniĝis. Rezulte de tio li perdis rilatojn kun sia familio. Kiam li estis 21-jara, li fariĝis lerta trompisto. Ĉar li havas altan statuson kaj elegantan aspekton, li multfoje ŝajnis sin armeano kaj faris ŝteladon en turisma servo. Foje li, en soldata uniformo kaj kun “oficiala” dokumento sub brako, forkondukis iun sian kunulon el arestejo. Pro tio liaj kunuloj kromnomis lin “veterano”. Li fariĝis fifama ŝtelisto en Harbin. Tamen li fine estis arestita en 1973 kaj kondamnita al dek-jara mallibereco.

En la malliberejo li estis la plej obstina kaj malobeema. Li ofte interbatalis kun aliaj, kon-

li vundis homojn en rabado. Nun jam ses jarojn li pasigis en la malliberejo. En la pasinteco li estis batalema kaj maldiligenta lernanto. Mil zorgojn liaj gepatroj verŝis sur lin, tamen tio estis tute vana. Post la enkarcerigo li lernis en klaso por malsupermezlernejanaro. Leginte la leteron, kiun li skribis al siaj gepa-

troj, ili preskaŭ ne kredis. . .

En la ferma ceremonio de la sportkunveno la provoso disdonis premiojn al la gajnintoj. Inter ili estis fontoplumoj, vestoj, ŝtrumpetoj kaj mantukoj. Poste la provoso diris al mi, ke okazigo de sportkunveno por malliberuloj estas utila por eduki kaj ŝanĝi ilin.



traŭparolis al edukistoj-policianoj kaj intencis forkuri. Sekve li estis enfermita en ĉelo duonjaron. Dum tiu periodo la edukistoj-policianoj ne ĉesis eduki lin. Ili analizis lian penson kaj opiniis, ke la perdo de la patrina amo en lia infaneco, la vagado dum multaj jaroj kaj la mallibereco perdigis al li fidon pri la estonteco. La pasintajn tri jarojn la edukistoj-policianoj interparolis kun li kelkcent fojojn por ŝanĝi lian penson kaj montri al li novan vojon. Samtempe, ili ĉiamaniere serĉis por li la patrinon. Ili fine informiĝis, ke lia patrino laboras en iu fabriko. Antaŭe ŝi pensis, ke la filo jam mortis. Dank' al la aranĝo fare de la malliberejo, la filo renkontiĝis kun sia patrino. Ekvidinte sian patrinon, Yang Yingzhong tre emociiĝis. Li demandis sin: Kial la edukistoj-policianoj serĉadis mian patrinon? Kial ili senlace laboris por ŝanĝi mian penson? Kial en la malliberejo ili lernigis al mi kulturajn kaj teknikajn sciojn? Ĉu ili ne celas turni min en homon utilan al la socio? Ĉe la adiaŭo li donis al sia patrino dek juanojn dirante: "Mi elkreskis, sed neniam donacis al vi ion. La mono, kiun mi

donas al vi, estas perlaborita de mi mem. Ekde nun mi aŭskultos vin." Poste Yang Yingzhong progresis rapide kaj vere fariĝis nova homo. Li estis plena de memfido pri sia estonteco. Li diligente lernis kulturajn kaj teknikajn sciojn kaj sin montris tre energia en sia laboro. Post ekzameno li fariĝis tria-klasa elektristo. Pro lia konduto oni anticipe liberigis lin je unu jaro, t.e. en januaro de 1982, kaj postenigis lin en fabriko de elektraj ekipaĵoj.

Unuafoje ricevinte sian salajron, Yang Yingzhong aĉetis vinon, kukojn kaj bombonojn por la familio de iu el la edukistoj-policianoj. Tiu danke rifuzis. Yang do verŝis la vinon surteren por esprimi dankon al li kaj foriris silente kun larmoj en la okuloj.

Ĉiutage li iris al la fabriko je unu horo pli frue por fari purigadon kaj preparadon. Li laboris tre aktive. Liaj kunlaborantoj tre ŝatis lin kaj zorgis lian vivon. Ili faris svatadon por li. Fine li ekamis fraŭlinon Ma Liying. Mi demandis ŝin, kial ŝi amas lin, iaman enkarcerigitan trompiston. La novedzino res-

pondis iom sinĝene: "Li konfesis al mi sian pasintecon. Mi vidis, ke li vere korektis sian eraron. Homo facile eraras dum sia tuta vivo. Antikva ĉina proverbo diras: 'Rebonigita diboĉulo superas oron!'"



*Yang Yingzhong  
kun sia novedzino  
Ma Liying en sia  
ĉambro*



# La fortikiĝo kaj disvolviĝo de la Okcidenta Han-dinastio

de BA HONG

## POLITIKO DE MALPEZAJ SERVUTO KAJ IMPOSTOJ

En la jaro 202 a. K. Liu Bang fariĝis imperiestro, kiu sin nomis Gaozu de Han-dinastio, kaj difinis Chang'an (nordokcidente de la urbo Xi'an en la nuna Shaanxi-provinco) kiel la ĉefurbon. La historiistoj nomis la dinastion Okcidenta Han. Analizinte la kaŭzojn de la pereo de Qin-dinastio, la imperiestro venis al la konkludo, ke ĝia regado estis tro rigora kaj kruela en traktado al la popolo. Tial li praktikis stabilan politikon de malpezaj servuto kaj impostoj. Tiuj rimedoj, kiuj donis al la popolo stabilan kaj kvietan vivon, iom post iom riĉigis kaj potencigis la Okcidentan Han-dinastion dum 50 ĝis 60 jaroj. La historio tiel registris la tiaman abundecon: "La staploj de la lokaj registaroj estis plenaj

de greno kaj la montenejoj plenaj de kupraj moneroj. La kortego akumulis dekojn da miliardoj da kupraj moneroj, kaj ŝnuroj de moneraj faskoj (en la periodoj de la dinastioj Qin kaj Han la mulditaj kupraj moneroj havis kvadratan trueton en la mezo; ili estis kunligitaj tra la trueto en faskojn per ŝnuroj) putriĝis, tiel ke la disfalintaj moneroj estis ne kalkuleblaj. La greno de la kortego staplita sub la ĉielo jam putriĝis." Ankaŭ la loĝantaro kreskis ĝis 60 milionoj da homoj: preskaŭ la duoblo de tiu en la periodo Militantaj Regnoj.


## PROSPERO DE LA DINASTIO

En 140 a. K. Wudi surtroniĝis. Li regis la landon pli ol 50 jarojn. Dum tiu ĉi tempo la feŭda socio de Ĉinio multe disvolviĝis

en politiko, ekonomio, militaj aferoj kaj kulturo. La Okcidenta Han-dinastio atingis sian kulminon de potenciĝo.

Sin apogante sur la potencaj fortoj akumulitaj de la prapatroj, la imperiestro Wudi ne plu volis fari nur kvietan regadon. Por forigi la nordan minacon li unue militis kontraŭ la hunoj, kiuj estis norda nacimalplimulto. Ĝi iom post iom potenciĝis en la tria jarcento a. K. kaj ofte forrabis loĝantojn kaj brutojn en la norda parto de Ĉinio. La imperiestro Gaozu siatempe komandis 320 000 militistojn kontraŭ la hunoj, sed estis sieĝita de 400 000 hunaj militistoj dum septagnotoj kaj liaj trupoj estis preskaŭ tute ekstermitaj. La postaj imperiestroj de Han-dinastio aplikis rimedon edzinigi junulinojn de la imperiestra familio al hunaj ĉefoj kaj doni al ili grandnombrajn donacojn por portempa paco, sed tio ne povis bari oftan sudenvenon de la hunoj por prirabi kaj detruiri.

La ambicia imperiestro Wudi ne volontis elteni tian situacion. Li do decidis puni la hunojn per milito. Li plurfoje militis kontraŭ ili. La unua fojo okazis en 127 a. K., kiam generalo Wei Qing komandis armeon ataki la hunojn, kiuj iam okupis la regionon Hetao ĉe la Flava Rivero.



Restajo de citadelo el la periodo de la imperiestro Wudi de Han-dinastio ĉe la pasejo Yumen, Gansu-provinco




Lia armeo venkis la hunojn. La imperiestro Wudi konstruigis tie urbojn, starigis lokan registaron kaj restigis tie garnizonon de pli ol cent mil militistoj, kiuj devis kaj militi kaj terkulturi. La dua fojo okazis en 121 a. K., kiam la juna generalo Huo Qubing komandis ĉirkaŭ dek mil elitajn rajdistojn, kiuj plurfoje venkis hunajn rajdistojn kaj fine konkeris la koridoran regionon okcidente de la Flava Rivero, kiu estis la unusola vojo al Xinjiang kaj meza Azio. La tria fojo estis decida milito inter la hunoj kaj la armeo de Han-dinastio, kiu komenciĝis en 119 a. K. Wei Qing kaj Huo Qubing faris militiron kun ĉ. 50 000 rajdistoj sub sia komando profunde en Gobion. Ili ekstermis la ĉefajn fortojn de la hunoj. Ekde tiam la hunoj foriris malproksimen de la nordo kaj ne plu kuraĝis starigi sian regadon en la suda regiono de Gobio.

La imperiestro Wudi konkeris ankaŭ la sudorientan regionon (la nunaj provincoj Zhejiang kaj Fujian) kaj ekspluatis la sudokcidentan regionon (la nunaj provincoj Yunnan, Guizhou kaj Sichuan), tiel ke fondiĝis senprecedence potenca Okcidenta Han-dinastio.

## LA SENDITO ZHANG QIAN AL MEZAZIAJ LANDOJ

En la periodo de la Okcidenta Han-dinastio oni nomis la Okcidenta Regiono la lokon okcidente de Dunhuang, Gansu-provinco, sude kaj norde de la montaro Tianshan, sude kaj okcidente de la lago Balkaŝo kaj la mezazian regionon. Tiam vivis tie iuj naci-malplimulto, kiuj okupiĝis ĉefe pri terkulturo kaj brutobredado.

La imperiestro Wudi dufoje sendis Zhang Qian kiel senditon



*Parto de la antikva Silka Vojo proksime al Dunhuang*

al mezaziaj landoj en 139 kaj 119 a. K. Zhang Qian estis varme akceptita de ili. Post tio ankaŭ tiuj landoj sendis sinsekve siajn senditojn kun raraj donacoj al Chang'an. La vinbero, granato, akvomelono, ajlo, karoto, ŝenoprazo, fabo, kukumo, sezamo k. a. el tiuj landoj estis enkondukitaj en Ĉinion. Ankaŭ famaj ĉevaloj el Dawan (la nuna sovetia Fergana regiono), muzikiloj, muzikaĵoj, dancoj, skulptarto kaj pentrarto el meza Azio kaj budhismo estis enkondukitaj en Ĉinion. Silkaĵoj, lakitaj objektoj, jadaĵoj, bronzaĵoj, belaj metiartaĵoj, putofosa metodo, teknikoj por fari paperon kaj fandi feron estis enkondukitaj el Ĉinio en tiujn landojn kaj Eŭropon.

La ĉina silko multe interesis eŭropanojn. Iufoje la romia imperiestro Cezaro en robo el ĉina silkaĵo vizitis teatron. Liaj korteganoj opiniis tion senkompare luksa. De tiam reĝoj kaj nobeloj de eŭropaj landoj konkure aĉetis ĉinajn silkaĵojn por montri sian dignon. Ili nomis la landvojon al Ĉinio la Silka Vojo.

La Silka Vojo kondukis de la ĉefurbo Chang'an, okcidenten

tra la koridora regiono okcidente de la Flava Rivero ĝis Dunhuang, de kie la vojo branĉiĝis en du kursojn. La suda kurso kondukis de Yangguan okcidenten, trairis laŭ la nordaj montopiedoj de la montaro Kunlun, tra Loulan (la nuna Ruoqiang en Xinjiang), Yutian (la nuna Hetian en Xinjiang) kaj Shache, trans la Pamira Altebenajo. Ĝi kondukis al Dayuezhi (en la nuna baseno de la rivero Amudarya), Partio (en la nuna nordoriento de la Irana Altebenajo), Seleŭkio (en la nuna Irako), Romio kaj aliaj regnoj. La norda kurso kondukis de Yumen okcidenten kaj laŭ la sudaj montopiedoj de la montaro Tianshan, tra Yanqi, Guizi (la nuna Kuche en Xinjiang), Shule (la nuna Kashi en Xinjiang) kaj tra la Pamira Altebenajo. Ĝi kondukis al Dawan, Kangju (proksime al la nuna sovetia urbo Samarkando) kaj Yancai (norde de la nunaj Kaspio kaj Aralo).

La Silka Vojo daŭris pli ol mil jarojn. Post la sesa jarcento ĝi estis iom post iom anstataŭigita de la mara vojo pro la disvolviĝo de mara navigado.

# FISKAPTISTOJ SUR LA RIVERO SONGHUA

de YIN YI

**H**AZARDO kondukis min ŝipe veturi laŭ la rivero Songhua de la urbo Jiamusi, Heilongjiang-provinco, al la gubernio Tongjiang, kie koncentriĝas la heĝeoj kaj kie mi vizitis la komunumojn Jiejinkou kaj Bacha.


La lokoj estas sur fekunda ebenaĵo, kie kunfluas la riveroj Songhua, Heilong kaj Usuri. Tie cirkulas popoldiro — “Oni povas ĉasi kapreolojn per bastono kaj kapti fiŝojn per ĉerpilo kaj fazanoj flugas rekte en kaldronon.” Vere, tio ne estas bombasto. Vintre kiam heĝeoj skias en neĝkovrita arbaro por ĉasi beston, ili povis foje trovi kapreolon falintan en profundan neĝkovritan kavon. Frumatene post kiam heĝeo malfermis la pordon, malsategaj fazanoj ĉion spite enflugas domen. Koncerne la “fiŝkapto per ĉerpilo” maljunaj fiŝkaptistoj diris al mi, ke antaŭ longe, kiam ili estis junaj, en la fiŝa sezono suprennaĝis de la maro kontraŭ la riverfluo svarmo da salmoj. Iom surprizite, la fiŝoj tuj malorde saltas, iuj eĉ ensaltis en la boaton kaj ŝancelas ĝin.

La heĝea nacieco estas la plej malgranda el la 56 naciecoj de Ĉinio. En la komenco de la kvardekaj jaroj ĝi havis nur ĉirkaŭ 300 membrojn kaj preskaŭ pereis. Nun ĝi jam havas pli ol 900 membrojn. Kun la disvolviĝo de produktado inter la heĝeoj, kiuj generacion post generacio okupiĝis pri fiŝado, ankaŭ aperis terkulturantoj. Tamen fiŝkaptado el la rivero restas ilia ĉefa produkta aktivado. La heĝeoj havas elstaran fiŝkaptan kapablon kaj rekonas diversspecajn fiŝojn per ondetoj sur la akvosurfaco. Se aperas rondaj ondetoj, kio montras ke en la akvo karmo serĉas manĝaĵon, la fiŝistoj do kondukas la boaton tien kaj pikas per forko la fiŝon, kaj ĉiam trafe. Se aperas ondetoj, kiuj etendiĝas duflanken, do estas certe, ke en akvo manĝas herba fiŝo. En la momento, kiam la fiŝo mordrompas herbon kaj sin turnas, la fiŝisto pikas la fiŝon deflanke per la forko kaj same trafe.

Vintre, spite froston je tridek gradoj sub la nulo, fiŝistoj truas la glacitavolon sur la rivero kaj tra la truoj kaptas fiŝojn per

reto, hoko aŭ forko kaj la rikolto estas abunda. Fiŝkaptistoj admonas, ke por forki fiŝojn sur glacirivero oni devas esti aparte singardemaj, alie granda fiŝo ilin tire entruigas.

La heĝeoj ŝatas rakonti pri Edun, mita fiŝkapta heroo. Oni diras, ke nenia malbona vetero povas malhelpi lin fiŝkapti. Iun tagon spite venton kaj ondojn furiozajn li iris boate fiŝkapti kaj trovis grandan fiŝon (*Huso dauricus*) neniam viditan antaŭe. Edun pikis la fiŝegon per forko, sed pro timo, ke la fiŝo fuĝos, li forte tenis la forkstangon. La vundita fiŝo renversis la boaton, kaj enakvigis ankaŭ Edun. Liaj kunuloj rapidis tien por lin savi. Kiam la fiŝo elakvigis, ankaŭ Edun aperis en la okuloj de kunuloj, kiuj laŭte vokis, ke li forlasu la forkstangon kaj enboatiĝu. Sed li obstine tenis la stangon kaj tirate de la fiŝo, refoje profundiĝis ĝis la fundo de la rivero. Kiam la fiŝo la trian fojon aperis ĉe la akvosurfaco, kunuloj forkis la fiŝon kaj kaptis ĝin. Tiam Edun svenis — lia kapo estis trafita per la vosto de la fiŝo, tamen li



*Kiel granda salmo!*



ankoraŭ tenis la stangon en la manoj. Pro tio la fiŝkaptistoj laŭdis lin kaj honoris lin kiel heroon de sia nacieco. Lia juna edzino tamen estis nekontenta pro la de li kaptita fiŝo kun multe da forktruoj, ĉar la vestoj faritaj el tia fiŝhaŭto ne estas belaj. Ŝi proponis al li: “Estus bone, se vi pikus fiŝon inter la kapo kaj surdorsa naĝilo.” Por akiri sendifektan fiŝhaŭton Edun kaj liaj kunuloj longe cerbumis kaj fine elpensis novan metodon. Ili ligis longan ŝnuron portantan flosilojn en fiŝaj aerovezikoj kun la fiŝforke. Pikinte la fiŝon, oni tuj delasis la stangon, por ke la fiŝo daŭre baraktu kun forko ĝis plena laciĝo kaj nur tiam oni eltiris ĝin. Por ke ne plu okazu neatenditaĵo, ili pikas la fiŝon per dua forko poste de la kapo ĉe ĝia elveno tra la akvosurfaco. Tiun metodon oni uzas eĉ hodiaŭ.

La heĝeoj generacion post generacio faras vestojn el tia fiŝhaŭto. En la malnova socio fiŝkaptistoj ofte interŝanĝis sekigitajn fiŝojn kaj ĉasaĵojn kontraŭ ŝtofo en urbo, malgraŭ ke ĉiufoje ili bezonis du-tri monatan ŝipveturon kaj krome ili suferis ekspluatadon de fikomercistoj. Sekve malriĉaj fiŝkaptistoj devigite uzis nur fiŝhaŭton kiel vestomaterialon. Ili detiris de fiŝoj la haŭton, sekigis ĝin, kaj poste martelis la sekigitan fiŝhaŭton por ke ĝi fariĝu mola kaj kudris ĝin en vestojn per fiŝhaŭta fadeo. Laŭdire, fiŝhaŭtaj vestoj povas rezisti kontraŭ humideco krom konservi varmon. Antaŭe iuj novedzoj portis fiŝhaŭtan surtuton kun sonorileto ĉe la baskoj eĉ en la geedziĝaj ceremonioj. Kun la progreso de la epoko kaj altiĝo de la vivnivelo nun la heĝeoj jam portas vestojn el teksa-



*Pikniko el nekuiritaj fiŝoj sur riverbordo*

joj. La fiŝhaŭta vesto jam fariĝis historiaĵo.

Iun tagon en Bacha mi veturis fiŝkapti sekvante Fu Xingwu, 50-jaran fiŝkaptiston. Li komencis sian fiŝistan vivon ekde sia 13-jara aĝo kaj estis tipa heĝeo kun ronda vizaĝo, mallarĝaj okuloj, altaj vangostoj kaj elstara nazponto, kaj aspektis sprita kaj kuraĝa. Li ĵetis en riveron reton, 500 metrojn longan kaj kvin metrojn larĝan. La fiŝboato, trenante reton, flosis laŭ la fluo, dum la fiŝoj, kiuj suprennaĝis kontraŭ la akvo fluo, renkonte enretiĝis senescepte. La reto estas la ĉefa fiŝkaptilo uzata de la heĝeoj.

Atingonte la finon de la rivero, la 24-jara helpisto Xiao Yang retiris la reton. Kun leviĝo de la reto aperis multaj fiŝoj: grandaj karpoj, grandkapaj fiŝoj, salmoj kaj herbaj fiŝoj vigle saltetas en la reto. Oni diras, ke en la fiŝkapta sezono unufoje oni povas enretigi pli ol kvincent kilogramojn da fiŝoj.

Revenante hejmen Xiao Yang gaje ekkantis heĝeajn kanton: “Heĝeoj dissemis mil retojn, la

rivero estas plena de boatoj, la boatoj estas plenaj de fiŝoj. . .” Ni alboridiĝis. La veterana fiŝistoto Fu Xingwu elprenis grandan karpon el la holdeto kaj prenis akran tranĉilon. Li senskvamigis kaj senhaŭtigis la fiŝon, distranĉis viandon ĉe ambaŭ flankoj de la karmo en striojn, metis ilin sur pladon kaj spicis ilin per salo, vinagro, cepo, ajlo kaj kapsiko. Li tranĉis lerte, tiel ke post sep-ok minutoj la plado el bongusta nekuirita fiŝaĵo jam estis preta.

La heĝeoj estas gastamaj. Ili regalas sian plej honoran gaston per “nekuirita fiŝo”. Mi neniam antaŭe gustumis tian nekuiritan fiŝon. Komence, mi iom hezitis, tamen la gastamo de la mastro kuraĝigis min. Vidinte, ke ili manĝas kun bona apetito, mi ekprovis gustumi ĝin. “Nu, kiel bone gustas!” Sekve ankaŭ mi plezure ĝuis tion.





Ilustritaj de JIANG FAN

## *Karnavalo en Barbado*

Barbado estas bela insulo kun areo de 430 kvadrataj kilometroj kaj klimato modera. Ĝi havas ĉirkaŭ dudek kvar mil hektarojn da sukerkankampoj, kiuj konsistigas 90% de la totala agraro de la lando. La sukera industrio estas unu el la ĉefaj branĉoj de la nacia ekonomio. La karnavalo estas tradicia festo de la barbada popolo, kiu aranĝas ĝin unu fojon ĉiujare por festi sian riĉan rikolton de sukerkanoj.

La karnavalo daŭras kvar semajnojn, t.e. la lastajn tri semajnojn de junio kaj la unuan semajnon de la sekva monato. La aktivado komenciĝas en la kamparo per tio, ke revenas la lasta grupo da ĉevalĉaroj plenŝarĝitaj per sukerkanoj. Unue iu frapas grandan gongon pendantan sur arbo de sukerfabriko. Sekve de tio la ĝojplenaj homamasoj iras

ĉirkaŭ la fabriko, sekvante la ĉevalĉarojn ornamitajn per koloraj rubandoj kaj freŝaj floroj. Ĉu viroj, ĉu virinoj, junaj aŭ maljunaj, ĉiuj estas feste vestitaj, kun freŝaj floroj sur la kapo. Iu virino en blankaj vestoj kondukas la unuan ĉaron por cediĝi vojon, kaj ŝin sekvas dekelkjaraj knaboj kondukantaj la ceterajn ĉarojn. Tiam eksonoras ĉiuj muzikiloj. La ĉevaloj henas, la homoj ĝoje kantas kaj dancas. Post la ĉirkaŭirado la festantoj sidiĝas ĉe tablo kun peklitaj viando kaj fiŝoj, ŝinko, kasavo, maizpano kaj rumo-dolĉa drinkaĵo el sukerkana suko. Oni aranĝas ankaŭ ludojn kaj konkursojn, kiel grimpo sur ole-ŝmiritaĵo stango kaj ŝnuro, kupto de porko kaj batalo per bastono. Ĉe la supro de la ŝnuro kaj ligna stango estas moneroj kiujn gajnas la venkintoj. Oni donas ole-ŝmiritan porkon al tiu, kiu kaptas ĝin la unua.

En la tago, kiam la aktivado transiras al la ĉefurbo Briĝtaŭno, la movoplena urbo boliĝas kaj fariĝas libera foirejo. Miloj kaj miloj da homoj faras aĉetojn. Lundo, la lasta tago de la karnavalo, kulminas la aktivado. Oni okazigas en la ŝtata stadiono ekspozicion de diversspecaj belaj pasamentoj de vestoj. La festantoj donacas unu al alia siajn lerte faritajn pasamentojn kaj naztukojn

por esprimi bondezirojn. La lasta programero de la aktivado estas forbruligi sinjoron Hardin, faritan el rekremento de sukerkanoj. Sinjoro Hardin en nigraj vestoj kaj ĉapelo reprezentas la laborestrojn subpremantajn la nigrajn sklavojn dum la kolonia regado. En muziko la manifestaciantoj dancante iras al granda herbejo por tie bruligi sinjoron Hardin. La ekscititaj ĉeestantoj ĵetas pluvon da ŝtonpecoj, ĝis kiam la sinjoro cindriĝas.


## *La roza festo de Fiĝioj*

La roza festo estas unu el la tri tradiciaj festoj de Fiĝioj, bela insullando en suda Pacifiko. Ĉiujare oni festas la unusemajnan feston en la ĉefurbo Suvo en aŭgusto, kiam prosperas ĉiuj floroj.


La fiĝia rozo estas tutjare kulturata florplanto apartenanta al tropikaj arbedoj. Ĝi prezentas kolorajn ruĝan, palruĝan kaj flavan, plej ordinare ruĝan, en formo de funelo. La arboŝelo kaj floro uziĝas kiel medikamento. La loĝantoj ornamas sian kapon kaj domon ofte per tiaj floroj.

Sur la ĉefaj stratoj staras feste ornamitaj koloraj arkpordoj kun koloraj flagetoj, koloraj lampoj, diversaj tropikaj floroj, arbofolioj kaj arbobranĉetoj.

La aktivado komenciĝas per maskomanifestacio. La stratoj estas ĉirkaŭitaj de sennombraj rigardantoj el diversaj lokoj de la lando kaj eksterlandaj turistoj. Paradas en la antaŭo la ŝtata policana orkestro de Fiĝioj. La manifestaciantoj portas diversajn vestojn, kaj sur la kapoj de iuj el ili sidas interesaj maskoj en formoj de besto, dio kaj fantomo. Estas tre ĉarmaj la ornamitaj ĉaroj de grandaj kompanioj kaj entreprenoj. Sur la ĉaro estas knabinoj el diversaj lokoj por la titolo "roza reĝino". Sekvas aro







## Interesa kulto al ŝarkoj

En la Salomona Insularo en orienta Pacifiko oriente de Papua Novgvineo troviĝas malgranda insulo, sur kiu loĝas tribo vivanta de fiŝkaptado kaj ĉasado de marbirdoj. La tribanoj kultas la ŝarkon kiel supernaturan estaĵon. Tie estas malpermesite kapti kaj buĉi ŝarkojn, kaj oni eĉ ilin kultas, se okazas ia grava afero.

En la tago de kulto la tuta insuleto kvazaŭ festus ion. La virinoj portas diversajn konkajn ornamatojn, dum la viroj kun diversaj plumoj sur la kapo venas al marbordo matene, kun nuda surpentrita torso. La kulto komenciĝas ĉe la sunleviĝo, kiam la tribestro per pinta tranĉilo buĉas porkon ligitan per ŝnuro. Li ĵetas en la maron ĝiajn koron, hepton, pulmojn kaj intestojn, poste tranĉas la beston en pecojn kaj same ĵetas en la maron. Pro tio ruĝiĝas la akvo de la golfo. Ŝarkoj fulme

alnaĝas por vori la porkovianĉon. Kiam oni ĵetis en la maron dudek ĝis tridek porkojn sammaniere, la kulto atingas sian kulminon. Tiam sep knaboj saltas en la akvon kaj ekludas inter la ŝarkoj. Sed tion la ŝarkoj ne rimarkas pro manĝado de la porkaĵo. La viroj kaj la virinoj kantas kaj dancas sur la bordo. La ĝojo daŭras, ĝis la ŝarkoj forkonsumas la viandon kaj la golfo kvietiĝas iom post iom.


La tribanoj tiel pie traktas la ŝarkojn, tamen iam ili ne povas eviti la atakon de la rabfiŝoj. Se ŝarko vundas iun knabon dum kulto aŭ iun viron dum fiŝkaptado, oni diras: "Tion li meritis pro sia atenco al ĝia sankta animo." Se ŝarkoj endanĝerigas multajn homojn, oni okazigas pli grandan ceremonion. Tio, ke la tribanoj oferas al ŝarkoj grandan parton de la porkoj sur la insuleto, kaŭzas al ili tre malfacilan vivon.

post aro da orde vestitaj junaj skoltoj. En la malantaŭo ludas marŝon la armea orkestro.

La vicaro mil metrojn longa iras tra la urbocentro al la placo Alberto, la centro de la aktivado.

Ĉirkaŭ la placo staras budoj, kie oni vendas malvarmajn trinkaĵojn, fruktojn kaj kukojn.

Nokte lumas la lampoj sur la placo. Sur provizora scenejo en la mezo de la placo oni prezentas diversajn popolkantojn kaj dancojn de Fiĝioj. Kulminas la aktivado en la nokto, post kiu ĝi baldaŭ finiĝos. En la mezo de la placo oni anoncas la juĝrezulton. Oni honoras tri elektitojn per reĝinaj kronoj kaj donas al ili premion. Oni donacas al bonfaraj institucioj la enspezon de la biletoj por la juĝaktivado kaj grandan parton de aliaj enspezoj.



# Iom pri la monda malarmado

## SERIOZA MINACO AL LA PACO

Post la Dua Mondmilito, pri la malarmado ĉiam zorgas la popolo tra la tuta mondo. Ekde sia Unua Ĝenerala Asembleo okazigita en 1946, UNO ĉiujare diskutas pri tiu problemo. En 1970, kiam UNO celebris sian 25-jariĝon, ĝi deklaris, ke la sepdekaj jaroj estu "Jardeko por Malarmado", kaj alvokis la registarojn de ĉiuj landoj kune klopodi por ellabori komunan planon pri ĉesigo de la konkuro en la armado kaj radikala malarmado. Dank' al iniciato kaj klopodo de nealiancitaj landoj kaj multaj malgrandaj kaj mezgrandaj landoj, en 1978 UNO okazigis specialan kunvenon pri malarmado. La samcela kunveno de UNO okazigita en junio ĉi-jare povas esti rigardata kiel ĝia daŭrigo.

En la daŭro de la jardekoj post la Dua Mondmilito en kaj ekster

UNO okazis multaj duflankaj kaj plurflankaj kunvenoj pri malarmado, dum kiuj sennombraj projektoj pri malarmado estis aprobitaj kaj diversaj proponoj tiurilataj estis prezentitaj de multaj landoj. Tamen ankoraŭ hodiaŭ la monda malarmado daŭre restas sur papero kaj atingis nenian veran disvolviĝon. Sed male, pli kaj pli akriĝas la konkuro en la armado kaj armila stokado. Laŭ statistiko, la totala sumo por milita elspezo de la tuta mondo jam superis 500 miliardojn da usonaj dolaroj en 1981, dum tiu en la 50-aj jaroj estis nur ĉ. 140 miliardoj. Nun la mondo havas tiel multe da nukleaj armiloj, ke ilia eksplodpovo egalas al miliono da atombomboj ĉiu egala al tiu jetita super Hiroŝimo en 1945. Tio serioze minacas la mondpacon kaj vekas maltrankvilon ĉe la popolo tra la tuta mondo.

Kun la akriĝo de la konkuro en la armado kaj plimultiĝo de la lokaj militoj kaj tumultoj, la pacama popolo tra la tuta mondo deziregas, ke oni plifortigu la malarmadon. Dum la lastaj jaroj en Okcidenta Eŭropo, Norda Ameriko kaj Japanio leviĝis nova tajdo por la pac-movado. Malgraŭ ke malsamajn politikajn vidpunktojn la partoprenantoj havas, estas ilia komuna volo kontraŭstari nuklean militon kaj la disvastigon de nukleaj armiloj.

## ŜLOSILO DE LA MONDA MALARMADO

Ĉu necesas la malarmado? Al tio eble neniu kontraŭas. Sed la ŝlosilo kuŝas en tio, kiun landon oni devas malarmi kaj kiamaniere oni devas tion fari?

Neniu povas nei la fakton, ke en la nuna mondo estas du po-

## NOVA PANTALONO

Adaptita de LU HE  
Papertranĉaĵoj  
de XUAN YONGSHENG



1. En la antikveco estis la flamiĝema viro Buzi. Lia edzino devis fari ĉion laŭ lia ordono, sen ia ajn eraro. Alie li insultis kaj batis ŝin.



2. Iun tagon Buzi revenis de foiro, kun pantalono ŝirita kaj malpurigita. Li diris al sia edzino, ke ŝi faru por li novan pantalonon el ŝtofo, kiun li ĵus aĉetis.



tencaj landoj kun plej grandaj militaj fortoj kaj plej multaj nukleaj armiloj. Ili havas 97% de la nukleaj ŝargokapoj de la mondo. Iliaj militaj bazoj kaj armitaj fortoj troviĝas en multaj strategiaj lokoj de la mondo. Se oni diras, ke la malarmado celas ĉefe redukti aŭ nuligi la militan minacon, do estas memkompreneble antaŭ ĉio postuli, ke tiuj du potencoj ĉesigu la konkuron en la armado kaj grandskale reduktu siajn militajn fortojn. La Unua Speciala Kunveno de UNO pri Malarmado klare deklaris en sia "Lasta Dokumento", ke por efektiviĝi la nuklean malarmadon "aparte gravan respondecon portas la landoj kun la plej granda stoko de nukleaj armiloj". Tio estas tute ĝusta, ĉar la landoj estas malsamaj laŭ la grandeco kaj malegalaj laŭ la militaj fortoj. Se oni ĝenerale elmetas kompletan kaj ĝisfundan malarmadon kaj proponas, ke ĉiuj landoj malarmu siajn militajn fortojn siavice, tio utilos nur al la militaj potencoj kaj malutilos al la malgrandaj kaj mezgrandaj

landoj. Tial, la du potencoj kun plej grandaj militaj fortoj devas unue malarmi siajn militajn fortojn. Tio estas unu el la bazaj principoj de malarmado kaj ĝuste en tio kuŝas la kerno de malarmado. La kaŭzo, ke ĝis hodiaŭ la malarmado atingis nenian rezulton, sed male, la armada konkuro pli kaj pli akriĝas kaj la milita minaco pli kaj pli kreskas, ĉefe kuŝas en tio, ke al la du militaj potencoj mankas praktika agado en la malarmado.

Konsiderante pri la grandega detrua forto de la nukleaj armiloj kaj pri la grava minaco de nuklea milito, la internacia kunveno pri malarmado ĉiam celas ĉefe ĉesigon de la konkuro pri la nukleaj armiloj kaj neniigo de la minaco de nuklea milito, kio estas ĝusta kaj necesa. Tamen tiuflanke oni neniel devas subtaksi redukon de la regulaj armitaj fortoj nek absolute apartigi ĝin disde la redukto de nukleaj armiloj. Estas ne konvene opinii, ke substreko de la redukto de la regulaj armitaj fortoj malhelpos la ira-

don de tiu de nukleaj armiloj. Efektive ne ekzistas ia ajn netrairebla interspaco inter la militoj regula kaj nuklea. Kaj por la du nukleaj potencoj, ili ja bazas sian militan strategion sur kuna irado de la regula milito kaj nuklea teroro. Sed por la malgrandaj kaj mezgrandaj landoj, precipe por la disvolviĝantaj landoj de la tria mondo, la minaco de la regula milito estas pli reala kaj pli rekta ol la nuklea milito. Estas fakto, ke post la Dua Mondmilito ĉiuj militoj estis regulaj kaj ĉiuj agresantoj uzis regulajn armilojn. El tio evidentiĝis, ke sola emfazo al la redukto de nukleaj armiloj kaj neglekto de la redukto de regulaj armitaj fortoj favoras nur al la ekspansiigantoj.

Ĉar la malarmado celas kontraŭstari al militado kaj defendi la mondpacon, tial la diskuto pri malarmado ne devas apartiĝi de la aktuala internacia situacio kaj des pli ne devas ignori la estantan agresadon malutilan al la mondpacon kaj sekureco. Ĉu oni



3. La edzino demandis: "Kian pantalonon mi faru?" Buzi respondis: "Kia demando! Tajlu tian, kiel la malnova."



4. La edzino faris novan pantalonon kun tiom da truoj kaj tiom da oleaj makuloj, kiom sur la malnova.



5. Ŝi prezentis la novan pantalonon al Buzi kaj diris: "Ĉu vi kontentas? Ĝi estas tute sama kiel la malnova. Kaj Buzi povis diri nenion alian ol silenti."

povus vane paroli pri malarmado, turnante nenium atenton sur la kruelan buĉadon al senkulpaĵoj homoj? Ĉu povas esti paco kaj sekureco, se daŭras agresado, la sendependeco kaj suvereneco de la tria mondo kaj la aliaj malgrandaj kaj mezgrandaj landoj ne estas garantiataj, kaj la mondo troviĝas ĉiam en tumultado? Nun en la diskuto iuj potencoj malvolontas kunligi la malarmadon kun garantio de la aktuala internacia sekureco, ĉar ili timas, ke ilia agresado estos malkaŝita kaj riproĉita de la popoloj. La racia opinio estas: La grandaj potencoj kun plej grandaj militaj fortoj devas ne nur grandskale malpliigi siajn nukleajn kaj regulajn armilojn, sed ankaŭ ĉesigi siajn hegemoniismon kaj ĉiajn ajn ekspansiiĝon kaj agreson. Nur tio povas krei favorajn atmosferon kaj kondiĉojn por la malarmado.

La malarmado estas tre kompleksa internacia problemo, pri kio troviĝas malsamaj opinioj kaj argumentoj. Estas preskaŭ neeble komplete solvi ĝin en iu kunveno. Por atingi paŝo-post-paŝan solvado de la malarmado, oni nepre devas distingi la ĉefan de la malĉefa, kapti la kernon de la problemo kaj doni ĉiuflankan politikan influon.

## SINTENO DE ĈINIO

Koncerne la malarmadon, la ĉinaj registaro kaj popolo estas ĉiam por la vera malarmado kaj faras aktivan klopodon por ĝia efektivigo.

Ekde la sesa jardeko la ĉina registaro multfoje faris proponon por malarmado kaj internacia sekureco. La ĉinaj registaro kaj popolo ĉiam kontraŭbatalas la konkuron en la armado, uzon de militaj fortoj kaj minacon per

tiaj fortoj en la internaciaj rilatoj. La ĉina registaro ĉiam kontraŭbatalas agreson kaj ekspansiiĝon, kaj aprobas la intertraktadon pri la nukleaj armiloj inter Sovetunio kaj Usono kaj esperas, ke ili atingos interkonsenton vere utilan al limigo de la nuklea armado kaj prevento de la nuklea minaco.

En la Speciala Kunveno de UNO pri Malarmado ĉi-jare, Huang Hua, la ministro pri eksteraj aferoj de Ĉinio, refoje deklaris siajn bazajn principojn pri malarmado kaj prezentis al la kunveno ĉefajn rimedojn por tuj ĉesigi la konkuron en la armado kaj fari malarmadon: "Ĉiuj landoj kun nukleaj armiloj subskribu traktaton pri neuzo de nukleaj armiloj, sed antaŭ ĉio ĉiu el ili devas fari senkondiĉan garantion ne uzi nukleajn armilojn kontraŭ tiuj landoj kaj regionoj, kiuj ne havas nukleajn armilojn, kaj ne uzi tiajn armilojn la unua unu kontraŭ alia en ĉiu ajn tempo kaj ĉiu ajn cirkonstanco." "Sovetunio kaj Usono ĉesu provi, plibonigi kaj produkti nukleajn armilojn, kaj samtempe reduktu ĉiuspecajn nukleajn armilojn kaj iliajn transportilojn, je duono, kaj post tio ĉiuj aliaj landoj kun nukleaj armiloj ĉesigu la provadon, plibonigon kaj produkton de nukleaj armiloj kaj reduktu siajn nukleajn armilarojn laŭ la konsentitaj proporcio kaj procedo." "Samtempe kun la malarmado de nukleaj armiloj oni devas redukti la regulajn armilojn. Kaj antaŭ ĉio ĉiu lando devas la unua promesi ne fari armitajn intervenon kaj invadon kaj militan okupon al aliaj landoj."

Ĉio ĉi supre dirita montras la devon al la malarmado, kiun Ĉinio estas prenonta. Fakte, la ĉina registaro multfoje faris ga-


rantiojn al la tuta mondo, ke Ĉinio ne uzos la unua nukleajn armilojn en ĉiu ajn tempo kaj ĉiu ajn cirkonstanco kaj ne uzos senkondiĉe tiajn armilojn kontraŭ lando sen ili. Lastatempe, la ĉina registaro deklaris ankaŭ, ke Ĉinio volontos kune kun ĉiuj aliaj landoj kun nukleaj armiloj preni sur sin la devon ĉesigi la disvolvado kaj produktado de nukleaj armiloj kaj sekve de tio pluaparte redukti kaj fine komplete nuligi tiajn armilojn, se Sovetunio kaj Usono la unuaj ĉesigos la provadon, plibonigon kaj produktado de nukleaj armiloj kaj reduktos siajn nukleajn armilarojn je duono.

Ĉinio estas unu el la disvolviĝantaj socialismaj landoj. Ĝia baza principo en la ekstera politiko estas unuigi kun la tria mondo kaj ĉiuj pacamaj landoj en la batalo kontraŭ hegemoniismo kaj por mondopaco. Por finkonstrui modernan socialisman landon, Ĉinio bezonas stabilan kaj longtempan pacan medion internacie. La socia sistemo kaj fundamentaj interesoj de Ĉinio decidis, ke ĝi nepre praktikas pacan politikon. Ĝiaj militaj fortoj, inkluzive de nukleaj armiloj, estas uzataj tute por la memdefendo kaj kontraŭ la deekstera agresado. Estas fakto, ke Ĉinio ne havas eĉ unu soldaton eksterlande, nek militan bazon ekster sia teritorio. Ĉinio leviĝos devigite por memdefendi, se aliaj agresos ĝin.

La malarmado finfine estas kiel preventi militon kaj defendi mondopacon. La batalo de la popoloj de ĉiuj landoj estas potenca movforto por antaŭenigi la malarmadon kaj defendi la mondopacon. Se nur la popoloj de ĉiuj landoj unuigiĝos kaj faros persistan batalon, la mondopaco estos daŭrigata plu.



# Bredata Zibela



La Esplora Instituto de Specialaj Produktaĵoj sub la Ĉina Agronomia Akademio estas bazo por bredi zibelojn. Tie 78 procentoj de la bredataj zibeloj estas naskipovaj kaj la tuta novnaskitaro vivas bone. La zibeloj pariĝas dum la tempo de la fino de junio ĝis la mezo de aŭgusto. La gravedeco daŭras 9 monatojn kaj ĉiu embrio entenas 2-4 idojn.

Zibelo vivanta en pingloarbaroj aspektas kiel putoro. Ĝia brunnigra felo kun densaj kaj brilaj vilaj haroj estas tre varmotenema kaj valorega por pel-taĵo.


Zibelidoj bredataj en kaĝo

Zibelo en neĝo



# *Latunaĵoj de Datong*

Fotoj de WANG SHOULIANG



La fajropotoj kun formeto ene povas teni supon bolanta dum manĝado.



Datong en Shanxi-provinco estas antikva kultura urbo. Antaŭ pli ol 2 000 jaroj ĝi jam ekhavis la metion de latunajoj. Komence oni produktis nur armilojn kaj poste ankaŭ ilojn bezonatajn de la popolo. Eĉ nun latunajoj estas ankoraŭ tre popularaj ĉe la popolo de Datong, ĉar ili en gracia formo estas longe uzablaj kaj iuj el ili povas esti uzataj de pluraj generacioj.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio la registaro organizis la metiistojn en kooperativojn, kiuj poste disvolviĝis en la Fabrikon de Metalaj Artajoj. Ĉiujare la fabriko produktas pli ol 10 000 pecojn da latunajoj, inkluzive fajropoton, fruktoteleron, sesangulan kruĉon, drinkilaron kaj inkskatolon.


La zorgeme poluritaj latunajoj de Datong estas brilaj kaj havas gracion antikvecan formon.




Ĉizado de desegnaĵoj sur la latunajoj




Oni vendas manĝaĵojn kuiritajn en latuna kaldrono.



Fruktotelero



Latuna drinkilaro



Latunaj kruĉoj

8152



洛神圖

率英

